

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Redakta komitato:

József Németh (red.)
Luiza Carol
Mireille Grosjean
Luigia Oberrauch Madella
Rob Moerbeek

Kunlaborantoj de la aktuala numero:

Monique Arnaud
Tatjana Auderskaja
Aurora Bute
Joseph Catil
Michel Dechy
Mireille Grosjean
Kimura Goro Christoph
Katalin Kováts
Stefan MacGill
Radojica Petrović
Isabelle Saulnier
kaj aliaj...



JARO DE LA LERNANTO



ilei

ENHAVO

<i>Enkonduko</i> (Mireille GROSJEAN):	3
KIMURA Goro Christoph: <i>Kiel Esperanton en Orienta Azio instrui?</i>	4
M. ARNAUD, J. CATIL, M. DECHY: <i>La franca ILEI-sekcio</i>	12
Isabelle SAULNIER: <i>Ludoj</i>	17
Mireille GROSJEAN: <i>Stereotipoj en lernolibroj</i>	20
Stefan MACGILL: <i>UEA kaj la instrua agado</i>	21
El la landoj kaj sekcioj (CN, DE, RS)	22
<i>Juna Amiko, la juvelo de ILEI</i>	28
<i>Internacia Konf. de Neregistaraj Organizoj</i> (M. ARNAUD, J-P. BOULET)	29
<i>Universitata agado: jen bona ekzemplo</i> (R. PETROVIĆ, A. BUTE)	30
Katalin KOVÁTS: <i>Ekparolu!</i>	33
Tatjana AUDERSKAJA: <i>Helplibro por instruistoj</i>	34
<i>La 50-a Kongreso de ILEI: Kongresa temo</i> (M. GROSJEAN), Simpozia alvoko, Infana Universitato, Konkurso pri emblemo de Infana Univ. (R. PETROVIĆ)	36
Informoj pri ILEI	41

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto: Mireille GROSJEAN „Mirejo”, Grand-rue 9, cp 9, CH-2416 Les Brenets, Svislando. <mirejo.mireille@gmail.com>. Tel. hejma (+41) 32 932 18 88, portebla (+41) 79 69 709 66. Rilatoj kun UNESKO kaj FIPLV. Observanto de ILEI ĉe UEA. Informado al ekstero. Ekzamenoj.

Vicprez.: GONG Xiaofeng „Arko”, School of Environmental and Chemical Engineering, Nanchang University, CN-330031 Nanchang, Ĉinio. <arko.gong@qq.com>. Universitata agado.

Sekretario: Emile MALANDA NIANGA. P. O. BOX 2787 Cape Town 8000, Sud-Afriko. <emalandan@yahoo.fr>, <ilei.sekretario@gmail.com>. Kontakto kun sekcioj. Koleghelpa Kaso.

Vicsekr.: Elena NADIKOVA. ul. Kadikova, 24-41, RU-428037 Ĉeboksari, Rusio, Tel. fiksa: (+7) 8352-648531, portebla: (+7) 919-670-25-34. <lena_espero@mail.ru>. Lerneja agado. Eo-centroj.

Estrarano pri financoj: William HARRIS „Vilĉjo”, Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530, Usono. <ilei.kasisto@gmail.com>. Tel. hejma (+ 510) 653 0998.

Estrarano: Radojica PETROVIĆ, Bul. oslobodjenja 36/14, RS-32000 Čačak, Serbio. Tel. hejma (+381) 32 371053. <radojica.petrovic.rs@gmail.com>. Kongresoj de ILEI, rilatoj kun TEJO, retaj aferoj, „Interkulturo”.

Estrarano: Ivan COLLING. Cx.P. 1701, Ag. Mal. Deodoro, Curitiba, PR. BR-80011-970, Brazilo. <iecolling@yahoo.com.br>. Universitata agado.

Scienca Komitato

Prezidanto: Humphrey Tonkin,
Usono, University of Hartford;
AdE¹

Membroj:

Duncan Charters, Usono,
Principia College, Elsah

Renato Corsetti, Britio/Italio,
Università degli Studi di Roma
„La Sapienza”; AdE¹

Probal Dasgupta, Barato, LRU,
Indian Statistical Institute,
Kolkata; AdE¹

Aloyzas Gudavičius, Litovio,
Šiaulių universitetas

Boris Kolker, Usono; AdE¹

Iłona Koutny, Pollando/
Hungario, Uniwersytet im.
Adama Mickiewicza w
Poznaniu; AdE¹

Stefan MacGill, Nov-Zelando/
Hungario, vic-prez. de UEA

Aleksandr Melnikov, Rusio,
Академия Сельскохозяй-
ственного
Машиностроения

Radojica Petrović, Serbio,
Univerzitet u Kragujevcu

Balázs Wacha, Hungario, MTA
Nyelvtudományi Intézet

¹ AdE – Akademio de Esperanto

Titolpaĝe supre: *La 4-a Eo-se-
majno en Baiyangshujie (CN)*
(vd p.24); **malsupre:** *ISOA 2016*
en Quanzhou (CN): nia prez. kun
3 sekciestroj (JP, CN, KR)(vd
p.22)

Enkonduko

Karaj legantoj,

Ni staras meze de la JARO DE LA LERNANTO. Okazas eventoj, aperas projektoj, petoj, sugestoj. Svarmas ideoj valoraj kaj konkretigendaj. La inform-kampanjo UNU LECIONO PRI ESPERANTO POR ĈIU LERNEJANO naskiĝis en Germanio kaj tuj vekis intereson en diversaj retlistoj; ĝi estas parte propaganda, parte instrua. Konsekvence ILEI ne povis resti ekster ĝi. Nun pretas la dokumentoj, kiuj estos je dispono de la instruistoj kaj esploremuloj. Strategiaj paŝoj disvolviĝas en la cerboj kaj komputiloj de aktiva laborgrupo, kie membras la prezidantino de ILEI.

Laŭ decido de la estraro nia revuo havu ĉefartikolon kun fakulaj strukturo kaj nivelo. Tion ni sukcesis en 2016/4 kaj denove en tiu ĉi numero: tre interesa artikolo de KIMURA G.C. traktas centran temon: Kiel instrui Eon en Orienta Azio, kie uzatas korea alfabeto aŭ ideogramoj (Japanio, Ĉinio) kaj aliaj pensovoj. Abunda prezento de nia KONGRESO en Busano allogos vin al tuja aliĝo. Ni preparis malavaran subtenkonkurson por ebligi al plej multe da personoj veni al Koreio. Niaj fondusoj utilos al tio. Bv konsideri, ke iel ilia enhavo devas kreski. La UEA-konto de ILEI estas ilek-a, je via dispono. Ni deziras al vi bonan legadon!

Mireille GROSJEAN
Prezidanto de ILEI

El prelego farita la 9-an de oktobro 2014 en Kameoka, Japanio, dum la 4-a ILEI-Seminario en Orienta Azio (ISOA)

Kiel Esperanton en Orienta Azio instrui?

de KIMURA Goro Christoph (Japanio), <g-kimura@sophia.ac.jp>

Pri la aŭtoro



KIMURA Goro Christoph (nask. 1974) estas ekde 2012 profesoro pri la germana kaj eŭropaj studoj ĉe la Fakultato por Fremdaj Lingvoj kaj Studoj de Sophia-Universitato en Tokio. Tie li instruas pri la germanaj lingvo kaj socio, eŭropa lingvopolitiko kaj internaciaj rilatoj. Krome li instrui/as la germanan lingvon kaj socilingvistikon ĉe diversaj japanaj universitatoj. Detala bibliografio ĝis 2012 (kun Esperantlingvaj tradukoj de titoloj) troviĝas en Informilo por Interlingvistoj, n-ro 84-85 (1-2/2013). En la lastaj jaroj li okupiĝis pri komparo de

Esperanto kun aliaj lingvoj el socilingvistika vidpunkto.

Resumo

Esperanto estas tre speciala lingvo inter la lingvoj de la mondo. Ĝi havas kelkajn trajtojn, pri kiuj instruistoj bone konsciigu, kiam ili instruas tiun ĉi lingvon. En tiu ĉi artikolo ni pripensu, kian sekvon por instruado havas la konsciigo pri la fakto, ke Esperanto nek estas „etna lingvo” denaske uzata de iu popolo, nek „fremda lingvo” por lernantoj, nek lingvo (nur) por eŭropanoj.

Saluton. Mi nomiĝas KIMURA Goro Christoph. Hodiaŭ mi venis de Tokio kaj tre ĝojas, ke mi povas ĉeesti la seminarion. En la programo vi povas legi, ke tiu ĉi prelego estas „speciala prelego”. Fakte mi cerbumis, kio estas speciala pri mia prelego. Sed nun vidante ĉi tie viajn vizaĝojn, mi finfine komprenis. Multaj el vi ŝajnas aŭ estas pli spertaj ol mi. Nun mi komprenas, ke tiu ĉi prelego estas tre speciala en tiu senco, ĉar kutime prelegojn faras homoj, kiuj estas pli spertaj, al homoj, kiuj estas malpli spertaj. Sed nun ĉi tie ne-spertulo prelegas al spertuloj.

Sed interese, tio kongruas kun la enhavo de mia prelego. Nome la kerna mesaĝo de mia prelego estas, ke ĉe Esperanto-instruado oni lasu

komencantojn aŭ ne-spertulojn libere esprimiĝi. Kaj instruistoj toleru tiujn esprimojn de malpli spertaj homoj, se ne temas pri klara eraro. Kaj mi eĉ intencas montri al vi, ke ankaŭ spertuloj povus lerni ion de ne-spertuloj. Do ni vidu, ĉu vi konsentas, kaj mi esperas, ke almenaŭ iuj partoj estos por vi instigaj aŭ inspiraj por instrui Esperanton.

1. Reagoj pri Esperanto en Orienta Azio

Reagoj de miaj studentoj

Kiel viaj lernantoj reagas, kiam ili eklernas Esperanton? Laŭ mia sperto, ofte oni surpriziĝas pri la reguleco de la lingvo. Ekz. unu studento mia skribis: „Mi pro la fideleco de Esperanto al reguloj surpriziĝis. Tion mi ĝis nun en aliaj lingvoj ne spertis”. Li antaŭe lernis la anglan, ĉinan kaj korean lingvojn, kaj en ĉiu lingvo kompreneble abundas esceptoj kaj neregulaj aferoj. Kaj ĉiu etna lingvo en la mondo kutime estas tia, ĉu ne? Do la reguleco estas tre kontentiga aspekto de Esperanto por lernantoj.

Aliflanke, tre ofte, tre tre ofte, mi renkontas opiniojn, kiel ekz. „Mi sentis, ke Esperanto bazita estas sur eŭropaj lingvoj kiel la latina aŭ la angla. Por homoj, kiuj tiajn lingvojn ne uzas, Esperanton lerni malfacilas”. Eble vi ankaŭ renkontis tiajn opiniojn, ĉu ne? Ekz. la uzo de la latina alfabeto jam estas problemo por multaj. Jam pro la literoj oni sentas psikan distancon al la lingvo. (Verŝajne ne imageble ĉe uzantoj de la latina alfabeto.)

Tipa kritiko al Esperanto

Venas ankaŭ akraj kritikoj, ke Esperanto estas tute eŭropa kaj ne taŭgas por azianoj. Iu konato mia skribis:

„Tiu, kiu propagandas, ke Esperanto estas neŭtrala lingvo kaj al neniu donus malavantaĝon, estas senhonta mensogulo. Certe Esperanto estas pli bona ol tio, ke ĉiuj terloĝantoj devas paroli la anglan imperiisman lingvon, sed ankaŭ Esperanto estas, kiel eŭropa lingvo, sufiĉe detruema kontraŭ ne-eŭropaj kulturoj samkiel eŭropaj imperiismaj lingvoj.”

Kion ni faru?

Do la demando estas, kion ni faru fronte al tia situacio. Ni en Orientazio havas pli malfacilajn kondiĉojn ol se oni instruas Esperanton en Eŭropo. En Eŭropo, mi jam spertis en Germanio, ke oni donas Esperantan tekston kaj studentoj diras: „Ha, mi komprenas, mi komprenas!”. Ĉar ili jam multajn vortojn konas. Tio ne eblas en Japanio. Eble kleraj homoj povas. Sed ne supozeblas, ke ordinaruloj povas tuj kapti la sencecon de la teksto. Do kion ni faru?

Teorie ekzistas du ekstremaj pozicioj. Unu vaste trovebla sinteno estas „Simple Esperanton lasi kiel ĝi nun estas”. Laŭ tiu sinteno, Esperanto fakte estas eŭropdevena lingvo kaj ni devas simple akcepti la eŭropecon de la lingvo. Sed je alia ekstremo estas homoj, kiuj volas „ŝanĝi” Esperanton. Laste mi vidis en korea Esperanta gazeto, ke iu profesoro faris novajn proponojn por „plibonigi” Esperanton. Aŭ estas homoj, kiuj mem ekkreas novan lingvon, kiu estu pli internacia ol Esperanto. Laŭ mia opinio, ambaŭ ekstremoj ne taŭgas. La unua sinteno tro pesimismas pri la evolukapablo de lingvo, kaj la dua sinteno tro optimismas pri intenca ŝanĝebleco de vivanta lingvo. Ambaŭ sintenoj ŝajnas al mi tro naivaj el sociolingvistika vidpunkto. Hodiaŭ mi volas pensi kun vi, ĉu ne ekzistas iu meza vojo, laŭ kiu ni povas iri kiel Esperanto-instruistoj en Orientazio.



ISOA 2016

Kia lingvo Esperanto estas?

Por trovi tiun mezan vojon, necesas konsciiĝi pri tio, kia lingvo estas Esperanto. Esperanto estas tre speciala lingvo inter la multaj lingvoj de la

mondo. Do, kio estas speciala en Esperanto kiel lingvo? Kiusence Esperanto malsamas disde aliaj lingvoj?

Unue Esperanto ne estas „etna lingvo”. Pro tio ĝi havas kelkajn specialajn trajtojn. Due, Esperanto ne estas „fremda lingvo” por la lernantoj, mi pensas. Oni kutime pensas, ke homoj havas „gepatran lingvon” kaj aliaj lingvoj estas „fremdaj lingvoj”. Sed Esperanto ne estas „fremda lingvo” por esperantistoj. Kaj trie Esperanto ne estas eŭropa lingvo. Almenaŭ ĝi ne estas nur eŭropa lingvo. Se tiel, mi volas demandi nin, ĉu ni instruu Esperanton simile kiel etnan lingvon aŭ fremdan lingvon aŭ eŭropan lingvon? Ĉu nia aliro al Esperanto estu tia? Mi pensas, ke por instrui Esperanton oni pli bone havu alian aliron al tiu ĉi speciala lingvo. Jen ni trarigardu la ĵus menciitajn tri ecojn.

2. Esperanto ne estas „etna lingvo”

Ĉi-sube mi resumis la malsamecojn inter Esperanto kaj etnaj lingvoj. Kutime etnaj lingvojn oni lernas denaske. Mi povis observi, kiel mia filo kaj mia filino lernis la japanan lingvon denaske. Ili ĉiutage senenue ekzercis kaj ripetadis, kion aliaj homoj diris. Tiel ili lernis sian denaskan lingvon. Sed Esperanton malmultaj homoj lernas tiamaniere, dum la plej multaj el ni konscie faras tion post infanaĝo. Ĉu ĉi tie troviĝas iu, kiu lernis Esperanton jam kiel infano? Neniu? Tipa situacio inter instruistoj de Esperanto.

	<i>etnaj lingvoj</i>	<i>Esperanto</i>
<i>normalaj uzantoj</i>	denaske lernis la lingvon	konscie lernis en post-infana aĝo
<i>ĝustaj esprimoj</i>	ĝenerale uzataj (normo)	laŭregulaj (sistemo)

Sekve, en normalaj etnaj lingvoj la ĝusta lingvouzo estas tio, kion denaskuloj uzas. Profesie mi estas instruisto de la germana lingvo. Kaj pri la germana lingvo mi instruas tion, kion germanlingvanoj uzas. Tio estas la ĝusta germana lingvo. Sed en Esperanto ĝusta ne estas tio, kion denaskuloj diras, sed kio estas konforma al la reguloj. Ĝenerale en etnaj lingvoj, ĝustaj esprimoj estas ĝenerale uzataj esprimoj. Sed en Esperanto, ĝustaj esprimoj estas laŭregula lingvouzo. Tio estas la baza diferenco.

Kiel instruisto de la germana, se studentoj skribas iujn frazojn nekutimajn, utiligante la regulojn, kiujn mi al ili instruis, mi korektas la skribitaĵon dirante, „germanlingvanoj tiel ne esprimas sin” aŭ „kutime oni diras tiel”. En

etnaj lingvoj, normoj estas specifaj formoj elektitaj el multaj eblecoj de la sistemo, kiuj estas vaste uzataj kaj pro tio rigardataj kiel ĝustaj.

Sed en Esperanto, principe ĉio, kion ebligas la lingva sistemo, estas Esperanto. La japana lingvisto TANAKA Kacuhiko skribis en libro pri Esperanto, ke „Infanoj certe Esperanton kun granda ĝojo lernas, ĉar ne ekzistas senkialaj normoj.” (Tanaka 2007, p.71).

Antaŭ kelkaj jaroj mi loĝis unu jaron kun mia familio en Germanio. Tiam miaj infanoj iris al germana lernejo kaj lernis la germanan lingvon. Mi rimarkis, ke ili lernas la germanan lingvon laŭ reguloj. Ekz. en la germana lingvo la pasintecon oni konstruas aldonante „-te” en la fino, kiel ekz. *ich lerne* (mi lernas) – *ich lernte* (mi lernis). Sed estas multaj verboj ne-regulaj. Ekz. la pasinteca formo de „ich gehe” (mi iras) estas „ich ging” (mi iris), de „ich trinke” (mi trinkas) estas „ich trank” (mi trinkis). Sed miaj infanoj komence fojfoje parolis laŭ la modelo „ich gehe”, „ich trinke”. Tio ne estas ĝusta, kvankam konforma al la regulo. En Esperanto, ilia laŭregula lingvouzo estus ĝusta.

3. Esperanto ne estas „fremda lingvo”

La dua punkto estas, ke Esperanto ne estas fremda lingvo. La interlingvisto Wim JANSEN skribis jene:

„Dank’ al la AAA-etikedo [pro travidebleco de la strukturo], ĉe multaj parolantoj observeblas (...) certa sentimenta aŭ eĉ afekcia ligo kun la lingvo, kiu estas eksterordinare malofta en la rilatoj, kiujn parolantoj kutime havas kun fremda, negepatra lingvo. La parolanto de Esperanto rapide hejmiĝas en la lingvostrukturo kaj sentas, ke rapide kreskas la memfido, kiu estas bezonata por aktive aliĝi al diskutadoj en internacia societo.” (Jansen 2010:31)

Tial Esperanto estas lingvo „malfremda”. Ĝi estas la lingvo de ĉiuj, kiuj ĝin lernas. Do, ankaŭ niaj lernantoj iĝos bazaj portantoj de la lingvo. La estonteco de la lingvo estos en la manoj de la lernantoj de la lingvo. Male, miaj lernantoj de la germana kutime ne estos rigardataj kiel bazaj portantoj de la germana lingvo. Ili simple lernas, kiel germanlingvanoj uzas la lingvon, sen mem iĝi ordinaraj membroj de la lingvokomunumo. La germana lingvo bone daŭros sen la lernantoj en diversaj partoj de la mondo. Sed Esperanto ne povas ekzisti sen novaj lernantoj, kiuj lernis kaj alproprigis la lingvon al si.

4. Esperanto ne estas (nur) „eŭropa lingvo”

Zamenhof fakte konceptis la lingvon jene:

„Mi aranĝis plenan dismembriĝon de la ideoj en memstarajn vortojn, tiel ke la tuta lingvo, anstataŭ vortoj en diversaj gramatikaj formoj, konsistas el sensanĝaj vortoj. Se vi prenos verkon skribitan en mia lingvo, vi trovos, ke tie ĉiu vorto sin trovas ĉiam kaj sole en unu konstanta formo, nome en tiu formo, en kiu ĝi estas presita en la vortaro. Kaj la diversaj formoj gramatikaj, la reciprokaj rilatoj inter la vortoj k. t. p. estas esprimataj per la kunigo de sensanĝaj vortoj. Sed ĉar simila konstruo de lingvo estas tute fremda por la Eŭropaj popoloj kaj alkutimiĝi al ĝi estus por ili afero malfacila, tial mi tute alkonformigis tiun ĉi dismembriĝon de la lingvo al la spirito de la lingvoj Eŭropaj, tiel ke se iu lernas mian lingvon laŭ lernolibro, ne traleginte antaŭe la antaŭparolon (...), – li eĉ ne supozos, ke la konstruo de tiu ĉi lingvo per io diferencas de la konstruo de lia patra lingvo.” (Unua Libro, Fundamenta Krestomatio, p.234)

Do, laŭ Zamenhof, Esperanto nur surface aspektas tiom eŭrope. Oni povas lerni Esperanton kiel iun eŭropan lingvon. Sed tio ne estas necesa. Kelkaj studoj pri la lingva karaktero de Esperanto ŝajnas subteni tiun vidpunkton. Mikael Parkvall komparis Esperanton kun aliaj lingvoj de la mondo kaj konstatis, ke laŭ surfaca rigardo al la vortoj, oni ofte pensas, ke Esperanto estas tre eŭropa lingvo. Fakte ĝi estas pli eŭropeca ol la subtenantoj ŝatus, sed malpli ol kritikantoj emas pensi (Parkvall 2010). Ofte kritikantoj vidas nur la surfacon kaj diras, ke Esperanto estas tiom eŭropa lingvo. Sed fakte ĝi ne estas tiom eŭropa, kiom ĝi ŝajnas.

Ankaŭ Ilona Koutny diris komparante Esperanton kun aliaj lingvoj, ke sub ekstera latinida formo kuŝas pli ĝenerala logika kaj tiel internacia strukturo (Koutny 2013, komparu ankaŭ Koutny [2017]).

El tiu konstato ni povas konkludi, ke ekzemple pri vortfarado ankaŭ ne-eŭroplingvanoj povus senti sin hejme en Esperanto. Bedaŭrinde la studo de Wim Jansen pri la evoluo de Esperanto kaj lernfacileco montras alian bildon. Li konstatis, ke eŭropaj Esperantouzantoj pli eŭropigis Esperanton ol ĝia origina desegno. Do komence Esperanto havis multajn eblojn evolui, sed fakte ĝi evoluis al iu speciala direkto kaj tiu direkto estis tre influita de eŭropanoj. Kaj ili ne komprenis la ‘flekseblan modelon’ de la Esperanta vortfarado kaj uzis Esperanton kvazaŭ sian gepatran lingvon. Tio igis la lingvon pli malfacile lernebla. Se tiu evoluo daŭras, post kelkdek jaroj ne plu

eblos diveni la signifon de vortoj el bazaj radikoj.” (pri tia evoluo vidu Jansen 2013)

Sed se tiu evoluo daŭras, Esperanto pli kaj pli similus al etna lingvo. Do Esperanto perdadas la plej bonajn ecojn kiel internacia lingvo. (Mal!)bona ekzemplo de facilanima intermikso inter eŭropdevena lingvo kaj Esperanto estas la aktuala Universala Kongreso en urbo nomata „Bonaero”. Kiam mi aŭdis, ke venonta UK okazos en Bonaero, mi pensis „Kia urbo tio estas? Kie troviĝas Bonaero?” Kaj poste mi eksciis, ke temas pri la konata ĉefurbo de Argentino. Mi tute ne sciis, ke Buenos Aires signifas bonan aeron. Do tio estas la eŭroplingva maniero, simple antaŭsupozi konon pri tiaj aferoj kaj tiamaniere traduki nomojn al Esperanto.

Sed ni imagu, kio okazus, se ĉiuj azianoj kaj aliaj neeŭroplingvanoj farus simile. Ekzemple, ĉu vi scias, ke en 2007 UK okazis en Horizontmarbordo? Tio estas la signifo de Jokohamo. La nuna ISOA okazas en Testudmonteto (Kameoka). Kaj hodiaŭ mi venis el la Orientĉefurbo (Tokio). Kaj ĉu vi konas la grandan ĉinan urbon Supermaro (Ŝanhajo)? Aŭ eble mi volas viziti la River-enon: Hanojo. Do, pli bone Buenos-Ajreso restu Buenos-Ajreso, eĉ se tiukaze iom pli longa ol „Bonaero”.

Ofta fenomeno estas la kutim-parolmanieroj, kiuj devenas de eŭropaj lingvoj. Do oni diras „De tempo al tempo”, kio spegulas la francan „de temps en temps”, anglan „from time to time” aŭ germanan „von Zeit zu Zeit” ktp. De tempo al tempo, kion signifas tio? Jam vi ĉiuj eble komprenas tion. Ni ja estas tiom influitaj de eŭropa pensmaniero. Sed tio ne estas logike komprenebla por japanlingvano (Kadoja 2011). Oni povus diri anstataŭe „fojfoje”, se uzi formon kompreneblan por japanlingvanoj.

5. Konkludo por instruistoj

Do, kion la supre menciitaj ecoj de Esperanto signifas por instruistoj de Esperanto? Unue, ni ne korektu lingvaĵon de lernanto nur pro tio, ke ĝi estas „nekutima”. Normale instruistoj de etnaj lingvoj estas tre korektemaj homoj, ĉu ne? Kiel instruisto de la germana, kiam studentoj uzas ian esprimon, kiu estas nekutima, strukturon kiun mi neniam vidis antaŭe, mi korektas tion pro tio, ke ĝi ne estas kutima. Sed en Esperanto ni ne korektu tiajn esprimojn nur pro tio, ke ni neniam vidis tiajn esprimojn. Ni devas lerni ne korekti ĉion al direkto de „kutima” lingvouzo. Ni lasu esprimojn, kiuj estas gramatike kaj semantike seneraraj kaj kompreneblaj, eĉ se nekutimaj. Ni ne forgesu, ke ni instruas ne ian etnan lingvon, sed Esperanton. En juĝejo oni diras, en dubo

por akuzitoj. Se oni ne certas ĉu iu persono estas kulpa, oni ne rajtas kulpigi tiun. Kaj pri Esperanto ni povas diri, dubokaze favore al la lernanto.

Due, instruistoj de Esperanto havas specialan respondecon ne nur por la lernantoj, sed ankaŭ pri la evoluo de la lingvo. Konscio pri lingva kultivado aŭ lingva flegado devus esti parto de instruistaj kaj gvidantaj kapabloj. Esperantistoj ĝenerale kunkreas kaj kunevoluigas la lingvon, kaj precipe instruistoj, kiuj edukas estontajn uzantojn de Esperanto, havas tian respondecon pensi ne nur pri progreso de la unuopaj lernantoj, sed pri tio, kiamaniere la lingvo evoluos, por ke ankaŭ estontaj lernantoj povu senti sin hejme en la lingvo.

La konkludo de la tria aspekto por instruistoj estas, ke aparte orientaziaj instruistoj de Esperanto havas gravan rolon en Esperanto-komunumo kaj movado. Nome savi ĝian internaciecon por la estontaj generacioj. Bedaŭrinde tio estas tre malfacila por (hind)eŭroplingvanoj, ĉar la vort-trezoro kaj strukturo de Esperanto tro similas al ilia gepatra lingvo. Male, orientazianoj ĉiam havas tiom da malfacilaĵo pri la vortoj kaj pro tio povas pli konscie konduti pri ĝia uzado ol eŭropanoj.

Japana esperantisto ISIGA Osamu iam skribis: „ne hezitu uzi esprimojn komfortajn kaj facilajn por ni [orientuloj], kondiĉe ke tio ne detruas la *Fundamenton de Esperanto* kaj ne malebligas interkompreniĝon kun okcidentaj esperantistoj.” Laŭ Isiga, ĉe tia „orientismo” en Esperanto, eŭropanoj sentos pli da fremdeco kaj bezonos energion por akcepti tion, sed tiajn sentojn kaj penojn pli ol sufiĉe kompensas la gajnoj de japanaj kaj aliaj orientaj esperantistoj, por kiuj la lingvo iĝos pli intima kaj facila (vidu Kimura 2008).

En la japana Esperanta gazeto *Revuo Orienta* antaŭ kelkaj jaroj aperis raporto de Mirejo GROSJEAN, kiu vizitis Japanion. Ŝi prave rimarkis, ke japanoj diras tiajn frazojn kiel „En Niigata neĝo estas ĉu?” Kaj ŝi skribas: „Tute bona frazo klara kaj ĝusta. Tamen iom stranga pro la vortvico” (*Revuo Orienta* 2009.5, p.28). Sed ni povus reipensi la vicon ankaŭ de tiu komenta frazo. Pli taŭgus por Esperanto jena vico: „Iom stranga pro la vortvico. Tamen tute bona frazo klara kaj ankaŭ ĝusta”.

Notoj

Mi kore dankas al Kawara Hiro pro helpo prepari la artikolon kaj István Ertl pro valoraj komentoj.

La originala prelego, kun konkretaj lingvaj ekzemploj, aŭskulteblas ĉe <http://esperas.info/index.php?ISOA>.

Bibliografio

- Jansen, Wim (2010): Esperanto: een taal van mij, een taal om van te houden / Esperanto: lingvo malfremda, lingvo aminda, *Interlingvistikaj Kajeroj* 1:1, 12-34.
- Jansen, Wim (2013): *Natuurlijke evolutie en leergemak. Aspecten van verandering in het Esperanto (Natura evoluo kaj lernfacileco. Aspektoj de ŝanĝigo en Esperanto)*, Esperanto Nederland.
- Kadoja, Hidenori (2011): La strukturo de Esperanto kiel faktoro por certigi ĝian funkcion rilate al Lingvaj Rajtoj: ĉefe pri la koncepto de lingvolernado kaj pri konscio de lingva normo, *Esperantologio / Esperanto Studies* 5, 7-27.
- Kimura, Goro Christoph (2008): Ĉu eblas deŭropigi Esperanton?, en: *Japana Eseo* 4, Libroteko Tokio, 83-89.
- Koutny, Ilona (2013): Ĉu Esperanto estas eŭropa lingvo? En: *Esperanto aplikata. Sciencaj kajeroj n-ro 1*. Red. Lidia Ligeża & Adam Lomnicki. Plock: Szkoła Wyższa im. Pawła Włodkowica w Plocku, 55-64.
- Koutny, Ilona [2017](eldonota): Tipologia katakterizo de esperanto kiel natura lingvo, *Esperantologio / Esperanto Studies* 8.
- Parkvall, Mikael (2010): How European is Esperanto? A typological study, *Language Problems and Language Planning* 34:1, 63-79.
- Tanaka, Kacuhiko (2007): *Esperanto*, Iwanami.

La franca ILEI-sekcio

Raporto farita de Monique ARNAUD (ekskasisto de GEE), Joseph CATIL (eksprezidanto de GEE) kaj Michel DECHY (prezidanto de GEE).

La franclingva sekcio de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), nomiĝas *Groupe des Enseignants d'Espéranto (GEE)*, (Grupo de Esperantistaj Edukistoj aŭ Instruistoj): por aliĝi necesas nur aldoni tiun deziron ĉe la tutlanda asocio *Esperanto France* ligita al UEA, kiu redonas 10 procentojn de la kotizo al GEE, do senpaga aliĝo, se vi estas membro de *Esperanto France*. Tamen se vi ne estas membro de Esperanto France, vi devas pagi etan kotizon (6€). Dank' al tiuj financaj rimedoj GEE kapablis organizi staĝojn por instruistoj en Kvinpetalo aŭ monhelpi kelkajn projektojn kiel „FRINGOJ” (internaciaj renkontiĝoj de infanoj) en kastelo Grezijono), kiel la ĥoruson MIREGE aŭ monhelpi por eldono de lernolibroj...

Nome de GEE anoj verkis: „Disvastigi Eŭropan Realecon fonditan per civitanecaj principoj”

Kaj „Enkonduko de Esperanto en Francajn Universitatojn” kaj provoj de instruado en lernejoj. Periodo: de 1975 ĝis 2004.

Individue, anoj de GEE povas aliĝi al ILEI. Ĉirkaŭ 45 membroj pagas sian kotizon al ILEI pere de la kasisto de GEE, sed estas ankaŭ kelkaj homoj, kiuj rekte aliĝas al ILEI.

Nuntempe en Francio oni konsideras, ke pli malpli cent homoj agadas kaj instruas Esperanton, sed ne ĉiuj aliĝas al nacia aŭ internacia organizaĵo.

Gravas ankaŭ en nia franca movado tiuj du lokoj famkonataj en Esperantio:

La **kastelo Grezijono** (*Château de Grésillon*) situas 250 km sudokcidente de Parizo en la urbeto Baugé-en-Anjou inter la urboj Anĝevo, Le Mans kaj Tours en la okcidenta Francujo.



Grezijono 2016 aŭgusto

La senprofitcela kooperativo „Kulturdomo de Esperanto”, fondita en 1951 de Henri MICARD, posedas la kastelon kun 18-hektara parko. La kastelon vizitas ofte lernantoj de Esperanto el la tuta mondo, precipe dum la somero kaj la francaj lernejoj ferioj. Ĉirkaŭ 1949, GEE planis aĉeti „burĝan domon por fari printempajn staĝojn por la lernantaj instruistoj por baza lernejo”. La ĉ. 900 GEE-anoj en 1950 dum sia kunsido okaze de nacia kongreso de UFE voĉdonis, plejmulte favore por tiu aĉeto.

Kvinpetalo estas Esperanto-Centro en Bureso (*Bouresse*) apud Puatiero (*Poitiers*), departemento Vienne, Francio. Kursoj prilingvaj, staĝoj divers-temaj (literaturo, astronomio, botaniko, komputiko...) en somero kaj en pluraj feri-periodoj dum la tuta jaro en vilaĝaj domoj, el kiuj kvin apartenas al *Societo Yvonne Martinot (SYM)*. La centron kreis en 1985 kelkaj sindonemaj esperantistoj, ĉefe francaj, interalie Georges LAGRANGE. Ĝis la jaro 1997 ĝi estis filio de LF-koop. De tiam ĝi estas tute memstara kaj ĝi funkcias kaj disvolviĝas plu en plena sendependenco. En tiuj lokoj, estas tre riĉa biblioteko kun multaj heredaĵoj de Gaston WARINGHIEN, Roger BERNARD kaj Maurice SUJET.

Lastan oktobron, de la 24a ĝis la 28a, dum la ferioj okazis staĝo en Kvinpetalo, estrita de Katalin KOVÁTS, „kiel esti pli efikaj dum la NAP instruado”. Tiu staĝo ricevis financon helpon de *Esperanto France* kaj estis granda sukceso, ĉar 17 instruantoj partoprenis.



Greziĵono 2012

Multaj kursoj okazas en Francio, oficialaj kaj „ne oficialaj”:

en bazaj lernejoj: oficialaj kursoj, sed nur al volontuloj fine de la lernotago, pere de NAP (Novaj Pedagogiaj Aktivaĵoj); fakte en ĉiu urbo kaj vilaĝo, tio estas respondecado de la urbaj instancoj, kiuj petas instruadon de la diversaj asocioj sportaj, artaj aŭ kulturaj. Plej ofte unu seanco ĉiusemajne ĉu jare ĉu dum parto de la lernojar.

Ne oficialaj kursoj, laŭ la invito de instruistoj en diversaj lernejoj: prezentado de Esperanto kaj eventuale kelkaj pliaj kursoj.

en mezaj lernejoj kaj superaj lernejoj (liceoj): Tiuj kursoj povas okazi dum la oficiala tempotabelo de liceanoj (Aleks ANDRÉ en Chaumont ...) aŭ dum libertempo kadre de kromagadoj de mezlernejoj.

en universitatoj aŭ altlernejoj: Okazis oficialaj kursoj en Universitatoj (Aix-en-Provence, Michel DUC GONINAZ; Clermont-Ferrand, Pierre JEANTON kaj Jean-Piere BOULET ...), sed ne plu okazas nuntempe oficialaj kursoj en Universitatoj. Ekde 2012 en la altlernejo ENSSAT de Lannion okazas kurso gvidata de Maja MERIAUX...

en Universitato pri Libera Tempo: oficialaj kursoj kiel la angla, la germana, la hispana... Ĉefe emeritoj, plej ofte eksinstruistoj partoprenas tiujn kursojn.

Ekzamenoj:

FEI (Franca Esperanto-Instituto), proponas ekzamenojn je kvar diversaj niveloj (enmovade agnoskitaj)

- Unua grado: *Atesto pri Elementa Lernado.*
- Dua grado: *Atesto pri Praktika Lernado.*
- Tria grado: *Atesto pri Supera Lernado.* Oni povas kompletigi per unu aŭ pluraj *Atesto(j) pri Kapableco*, elektitaj inter: *Pedagogio; Turismo kaj interpretado; Informado; Sciencoj kaj Teknikoj.*
- Kvara grado: *Diplomo pri Altaj Esperantaj Studoj.*

KER - (Komuna Eŭropa Referenc-kadro pri lingvokapablo) ekzamenoj: multaj francoj trapasis kaj daŭre trapasas tiujn ekzamenojn B1, B2 aŭ C1. Temas pri ekstermovade agnoskitaj ekzamenoj [*surfote: parola KER-ekzameno*].

Plej ofte la kandidatoj preparas kaj trapasas tiujn FEI-ekzamenojn dum staĝoj en Kvinpetalo aŭ Grezijono. Sed eblas trapasi tiujn



ekzamenojn ankaŭ okaze de naciaj kongresoj aŭ de ekzamensesioj regule organizataj en kluboj. Trapasu ilin eĉ dum la Internaciaj Renkontiĝoj de Pluezek, kiuj okazas ekde dudek jaroj en Bretonio la trian semajnon de aŭgusto! En 2012 kaj 2013 okazis KER-ekzamensesioj en ĉirkaŭ dek francaj urboj.

Ĉu en Francio oni ŝatas trapasi ekzamenojn aŭ ĉu oni emas fieri pri siaj „belaj” diplomoj?

Edukado.net:

Kia plezuro esti membro de tiu granda familio kaj uzi la grandegan stokon da pedagogiloj senpage disponeblaj. Tamen proponi novajn erojn aŭ foje riĉigi la pedagogian materialon estus ankoraŭ pli efika por nia movado. GEE, kiel *Esperanto France* aŭ diversaj kluboj aŭ individuaj membroj, monsubtenis la renovigon de la retejo de Edukado.net.

En 2006 kaj 2007 okazis en Kvinpetalo staĝoj por instruantoj gvidataj de Béatrice ALLÉE, grava kontribuanto ĉe *edukado.net* kaj de Michel DECHY „kiel instrui pere de bildrakontoj”.

Reprezentantoj ĉe Unesko:

Aparta laboro de la franca ILEI sekcio estas rilati kun UNESKO okaze de specialaj eventoj. En 2001 kaj 2003 Jean-Pierre BOULET kaj Vincent CHARLOT ĉeestis la Ĝeneralan Konferencon. En 2005 J.P. BOULET kaj Monique ARNAUD decidis disdoni flugfoliojn por prezenti Esperanton kaj la Ligon ILEI. Tiel ili redaktis prezentadon kun helpo de Jo CATIL por la enpaĝigo kaj estis 2 versioj la franca kaj la angla. Tiam ILEI havis „operaciajn rilatojn” kun UNESKO. De Italujo venis Ranieri CLERICI kaj dum kelkaj tagoj François LO JACOMO venis por helpi al ili. La Ĝenerala Konferenco okazas ĉiun duan jaron; do ili daŭre laboris tiel ĝis 2007. Tiam pro ne sendo de raporto ĝustatempe ILEI perdis siajn „operaciajn rilatojn” kaj ek de tiam ili devas peti permeson por ĉeesti la Ĝeneralan Konferencon kiel observantoj. Same por partopreni en la Internacia Konferenco de Neregistaraj Organizoj, kiu kunvenas ĉiun duan jaron.

ILEI forte deziras reakiri rilatojn kun UNESKO; do en 2008, kiam la ILEI-Konferenco okazis en Benino, J.P. BOULET proponis atelieron por verki libreton laŭ la modelo de la UNESKO libretoj. GEE (la franca ILEI-sekcio) zorgis pri la printado, la presado kaj la sendado de tiu libreto al Afriko kaj respondecis pri la elspezoj. Tiu verkado „Rakonto pri Tarofolioj” estis tradukita al la franca.

Poste la varbiloj estis tradukitaj al la 6 oficialaj lingvoj de UNESKO kaj en 2016 al 8 pliaj lingvoj. Ĉiun duan jaron tiu dokumento estas ĝisdatigita kaj plibonigita.

Ekde 2017 la franca sekcio ne plu respondecas pri la informiloj. Estus bone, ke homoj de najbaraj landoj (aŭ pli foraj) pripensu, ke ankaŭ ili povus vojaĝi al Parizo kaj efike labori en tiuj internaciaj kaj tre interesaj renkontiĝoj!

Projektoj kaj Esperoj:

Ke finfine liceanoj povus elekti Esperanton kiel oficialan kromfakon, kiam ili trapasas la bakalaŭran ekzamenon fine de siaj liceaj studoj.

Ke ni havu pli da lernantoj en niaj diversaj proponitaj kursoj.

Ke malnovaj agemuloj, kiuj ĉiujare maljuniĝas, trovu pli facile anstataŭantojn ...

Kvankam la nombroj de la movadanoj kelkfoje ŝrumpas, oni ja scias, ke per la Reto ne plu necesas aliĝi al iu klubo por eklerni la lingvon; mi dankegas ĉiujn membrojn, kiuj daŭre pagas sian kotizon al niaj asocioj. Gratulojn al ĉiuj agemuloj, kiuj informas, reklamas, tamtamas kaj varbas, prezentas kaj instruas Esperanton en la plej diversaj lokoj kaj medioj. Dankegon ankaŭ al tiuj eminentuloj (Brian MOON, Claude NOURMONT, François LO-JACOMO ...), kiuj responsas aŭ zorgas pri Kvinpetalo aŭ Grezijono, por ke daŭre okazu tie la multnombraj staĝoj kaj aranĝoj pri nia kara lingvo.

Ludoj

de Isabelle SAULNIER (<http://ludoj.neowordpress.fr>)

Lerni lingvon postulas daŭran laboron, diligentan trejnadon, tedajn ripetadojn ... Eĉ por lerni Esperanton, necesas persisteco kaj kuraĝo. Ne eblas lerni sen peno.

Ĉu ludoj povas faciligi la lernadon? Mi opinias jese.

Infanoj ŝatas ludi. La ludo nepras en la evoluo de la infanoj. Ili ludas sole, grupe, kun pupoj, kun fantaziaj kunludantoj. Plie, ludante, ili parolas kaj lernas la gepatran lingvon. Ne nur infanoj ŝatas ludi, multaj plenkreskuloj ŝatas ludi, eĉ la emerituloj kreas ludklubojn.

Enmeti ludojn en Esperantan kurson vigligas la partoprenantojn, ili manuzas kartojn, ĵetkubojn, kaj iĝas pli observemaj, vigle atentaj. Eĉ la dormemaj lernantoj vekigigas por partopreni. Ludoj instigas al pli da volonteco, aktiveco kaj pliigas la kunlaborecon.

Inicado al Esperanto per ludoj

Elŝuteblaj ludoj en Esperanto

Accueil Alfabeto Kartludoj Tabulludoj Starante ludi Kontakto Ligiloj

Kartludoj

<p>Télécharger Elŝuti</p>  <p>Demandoj Respondoj 1</p>	<p>Télécharger Elŝuti</p>  <p>Demandoj Respondoj 2</p>	<p>Télécharger Elŝuti</p>  <p>Frazado 2</p>	<p>Télécharger Elŝuti</p>  <p>Bredado</p>
--	--	---	---

<http://ludoj.neowordpress.fr>

Mi kreis la retejon „Inicado al Esperanto per ludoj”. Ĉi tie vi trovos ludojn en Esperanto. La celo de tiu ĉi retejo estas disponigi ludojn al aliaj esperantistoj por kontribui al la disvastiĝo de Esperanto.

Por ĉiuj ludoj, ludregulo estas trovebla je la fino de la dokumento, tamen laŭplace, uzu ilin kun viaj propraj reguloj. La ludoj estas elpensitaj por ne tro longe daŭri kaj la reguloj estas rapide klarigeblaj.

Vi povas printi, plastizi, eltondi la kartojn, laŭvole kaj senpage. Vi trovos ludojn sub la 4 langetoj: „Alfabeto”, „Kartludoj”, „Tabulludoj” kaj „Starante ludi”.

La langeto „Kartludoj”

La kartludoj traktas diversajn temojn kiel la familio, la bestoj, la koloroj, la vestoj, la homa korpo ...

Ekzistas du versioj de la ludo „**Demandoj-Respondoj**”, la unua pli taŭgas por baza nivelo aŭ infanoj kaj la dua por plenkreskuloj. Ĝi instigas al ripetado de komunaj kaj utilaj demandoj kaj respondoj.

La ludo „**Frazado**” entenas 24 verbojn, ĝi ebligas konstrui neatenditajn frazojn kaj ebligas amuzante zorgi pri la finaĵoj „n” kaj la „j”.

La ludoj „**Grupigi bestojn**” funkcias kiel la fama „Rami”. La du disponeblaj ludoj entenas malsamajn bestojn.

La ludo „**Bredado**” estas rapide komprenebla, la ludantoj tuj scias la neceson havi kokon kaj kokinon por havigi kokidojn, kaj ili facile komprenas kiel uzi la vulpon en la kokejo de la kontraŭludantoj. Mi elektas ĝin por ludi kun neesperantistoj. „Bredado” bone funkcias kaj vekas la scivolemon pri la sufiksoj „in”, „id”, „ej”.

Ĉiuj, kiuj volonte desegnas, ŝatos la ludon „**Desegnu la homan korpon**”. La langeto „Kartludoj” enhavas 18 ludojn, kiuj taŭgas por infanoj kaj plenkreskuloj.

La langeto „Alfabeto”

La langeto „Alfabeto” entenas la originon de tiu ĉi projekto. En 2014 kun du aliaj esperantistinoj ni proponis la temon „Inicado al Esperanto per ludoj” en francaj bazlernejoj en Voreppe (proksime de Grenoblo). Ni kune kreis ilustritan alfabeton kaj ludojn, kiuj uzas ĉefe la 28 vortojn de nia alfabetfolio.

La ilustrita alfabeto taŭgas por lerni la prononcon de la Esperantaj literoj. Intence ĉiuj vortoj finiĝas per la litero „o” krom „ŝuoj”. Jen la okazo por insisti pri la prononco de ĉiuj literoj, ankaŭ la plurala litero „j”.

La ludo „Senpara karto” traktas kolorojn. La lotludo ebligas paroli pri la akuzativo. La ludo „Aĉetu” estas tabulludo por uzi ĵetkubon, monon, kaj spertiĝi pri la nombroj de 1 ĝis 12.

La 8 disponeblaj ludoj ĉi tie estas uzeblaj por inici infanojn pri Esperanto, interalie en francaj bazlernejoj kadre de nova organizado de la lerneja tago.

La langeto „Tabulludoj”

Mi proponas kvar tabulludojn. Krome printi la tabulon, vi bezonos kubon kaj peonon por ĉiu ludanto. Ili estas iloj por kalkula trejnado.

La ludo „tri porketoj” estas la plej ŝatata, ĝi estas inspirita de tre fama tradicia rakonto; por kontraŭstari la lupon, la tri porketoj devas kunlabori.

La langeto „Starante ludi”

Sub la langeto „Starante ludi”, vi trovos kelkajn ideojn por ludigi infanojn. La celo estas, ke Esperanto eniru la kortojn de lernejoj. Ni jam spertis tion, kaj iom post iom, ni aŭdas infanojn kiuj kantas Esperante aŭ uzas la ludon „ŝtono, papero, tondilo” inter si.

Bonvenon en „*ludoj.neowordpress.fr*”

Por ĉiuj ludoj, la ludreguloj estas skribitaj en Esperanto. La ludoj „Bredado” kaj „Tabeligi” enhavas Esperantajn kaj franclingvajn ludregulojn.

Mi pardonpetas pro mia neperfekta Esperanto. Se vi bezonas klarigojn, se vi vidas erarojn, ne hezitu uzi mian blogon aŭ mian retadreson. Mi estas akceptema al rimarkoj, sugestoj kaj por ŝanĝoj, korektoj, apartaj bezonoj, mi pretas fari mian plejbonon.

Malkovru ludojn, spertu ilin kaj ĝuu!

Stereotipoj en lernolibroj

de Mireille GROSJEAN (Svislando)

„Ruso trinkas vodkon. Franco trinkas ruĝan vinon. Germano trinkas bieron. Brito trinkas teon.” Tiaj frazoj aperis en la lernolibro, kiun mi devis uzi por instrui la germanan al franclingvanoj en Svislando. La celo de la ekzerco estis, ke la lernanto vidu la diferencon inter „der Russe, der Franzose, der Deutsche, der Engländer” la homo, ruso, germano, franco, brito, kaj „russisch, französisch, deutsch, englisch” la lingvo: la rusa, la franca, la germana, la angla. Temis pri ekzerco en lingva laboratorio, do en cirkonstancoj, kie la lernanto studis sola, ricevis fiksan skemon kaj devis modifi la frazon laŭ ekzemplo. Kompreneble la trinkaĵoj donis facilan manieron „difini” la homon kaj la aŭtoroj de la ekzercoj falis en la kaptilon. Ĉiam estas pli simple iri al tiaj ĝeneralaj asertoj, kiuj ne ĉiam estas veraj, kiuj estas ofte troaj ĝeneraligoj. En la franca „généralisations abusives”.

Antaŭ nelonge oni legis en la lernolibroj „La patro sidas en la vivĉambro kaj legas gazeton. La patrino lavas teleraĵojn en la kuirejo.” Tiaj frazoj malaperis el niaj lernolibroj (eble ne ĉie en la mondo), ĉar la egalrajteco de la genroj progresis. „Purigado” de la lernolibroj ne estas finita tasko. Tiaj frazoj, eĉ se ili nur montras ian gramatikan strukturon, restas en la memoro de la lernantoj. Ili impresas. Ili povas senkonscie gvidi nin.

Ni vidas, ke la respondeco de la aŭtoroj same kiel tiu de la instruisto estas gigantaj. En ĉiu ekzerco ni pensu pri taŭga enhavo, vera, valora. Ne nur gramatike ĝusta, sed enhave riĉiga. Same kiam ni verkas testojn.

Sed nia menso tre ŝatas ilin. Tiaj ĝeneralaj asertoj „japanoj estas ne altaj”, „svisoj estas monavidaj”, „italoj estas mallaboremaj”... iel iom trankviligas nin, donas kadron, donas ian sekurecon. Fine de vigletosa manĝo kun multaj ŝercoj kaj ridoj franca kultura ataŝeo diris al mi: „Vi ne estas sviso!” Mi protestis. Li aldonis: „Svisoj estas malrapidaj kaj tedaj!”. Tion oni altrudis al li kaj en tiu vespero li konstatis la malon.

Same nia menso ŝatas, kiam la instruisto diras: „En la germana estas 5 prepozicioj, post kiuj venas la akuzativo: durch, für, gegen, ohne, um”. Punkto fino. Se la instruisto asertas tiajn frazojn, la lernantoj certe diras: li estas bona instruisto! Tia instruisto donas klarajn indikojn kaj la lernanto sentas fidon. „Esperanto ne enhavas esceptojn”: jen danĝera frazo...

Se la lernanto plu studas la germanan, li/ŝi trovos aliajn prepoziciojn, ne multajn, kiuj ankaŭ postulas la uzon de akuzativo. Kio okazos? Li/ŝi perdos la fidon en tiu instruisto kaj eble eĉ dubos pri ĉio, kion tia instruisto diris. Tion mi povis observi ĉe lernantaj personoj. Tuj vi komprenos, ke tio estas evitinda. Tamen kion fari? Kiel instrui?

Mi elturniĝis jene: „Jen 5 prepozicioj kun akuzativo. Bonvole lernu ilin. Estas aliaj, tamen nun en via nivelo la programo postulas, ke vi sciu tiujn kvin. Ni lasu iom da laboro al tiuj, kiuj pli kaj plu studos la germanan!” Tiel la lernantoj kaptas la vastecon de la lernendaj aspektoj. La instruisto ne rajtas normigi la mondon, simpligi la mondon. La mondo estas komplika, vasta, ne havas ortajn angulojn, ne konas finitajn listojn nek klarajn limojn. Tion la instruisto devas montri, ne kaŝi, ne modifi, kaj samtempe kuraĝigi la lernantojn eniri en ĝin. Malfacila tasko.

UEA kaj la instrua agado

de Stefan MACGILL (Hungario/Nov-Zelando)

La januara revuo *Esperanto* (RE) dediĉas unu paĝon al la 50a Kongreso de ILEI en Busano, kun kvar allogaj fotoj. Estas raportitaj la rezultoj de la jarfina sesio de la ekzamenoj UEA/ILEI en Bunda, Tanzanio. Ne precize ILEI, sed aperas dupaĝa ilustrita prezento de la ĉina muzeo en Zhaozhuang verkita de Mirejo GROSJEAN. La februara dediĉos malmultan spacon al ILEI, sed ni rezervas lokon por ILEI en la marta.

Atentindas la rekomendoj de la 29a seminario de Aktivula Maturigo (AMO), kiujn ni planas aperigi en la februara RE. Kvar el la naŭ rekomendoj rilatas rekte al lerniloj kaj instruado. En Afriko, praktike ĉiu aktivulo devas esti instruisto aŭ minimume kursgvidanto. Oni mem ege koncias pri la imperativo multe instrui la lingvon.

La Jaro de Lernanto bone progresas. Ĝi ricevos duontagan sesion en la februara studsesio en la universitato UAM en Poznano, Pollando, same en maja aranĝo en Vroclavo. Ĝi estis traktita en Bunda.

El la landoj kaj sekcioj

Ĉinio

Raportoj pri la 5-a ILEI-Seminario en Orienta Azio (ISOA)

La 5-a ISOA okazis ĉi-foje kadre de la 8-a Azia Kongreso okazinta de la 3-a ĝis la 6-a tago de novembro en la urbo Quanzhou, Ĉinio. La ISOA, kun la tre trafa kaj aktuala ĉeftemo „Lerni Esperanton per modernaj metodoj” ja fine montriĝis plene sukcesa – kun ĝustaj, taŭgaj programeroj laŭ la ĉeftemo, kvankam la kunsido estis malfermita dum du duontagoj (nur posttagmeze de la 4-a kaj antaŭtagmeze de la 5-a).

La 5-a ISOA komenciĝis per la malferma saluto de la estrino de ILEI-CN, prof. d-ro GONG Xiaofeng, kaj ŝi prezidis la Seminarion. Kaj la prezidantino de ILEI, s-ino Mireille GROSJEAN, prelegis pri tio ‘kiel ellerni Esperanton, montrante procezon de penso de homo kaj 5 sensojn: flarado, aŭdado, vidado, gustumado kaj tuŝado.

Tre menciindas, ke du demonstraĵoj kursoj inter la prelegoj kaj aliaj programeroj estis tre utilaj por diskuti pri la problemoj en orientaj aziaj landoj. Unu el la du estis la instrumaniero al progresantoj; kiel efike voĉlegi frazojn Esperantajn por glate elbuŝigi lingvon, la alia estis por komencantoj, kies demonstristino nun instruas Esperanton kiel enkondukan kurson al la 9-aŭ 10-jaraj geknaboj en baza lernejo. La partoprenantoj fervore aŭskultis la parolantojn kaj serioze koncentris sian atenton al bildoj sur sceno. Aldone al tio, oni devas konstati, ke homoj okupis la ĉambron plenplene. Tio reliefigas la malfacilecon ellerni fremdajn lingvojn, precipe eŭropajn al azianoj.

Krom du demonstraĵoj kelkaj prelegoj okazis pri la universitata instruado de Esperanto kaj Esperantologio de Prof. d-rino Ilona KOUTNY kaj Indramang-Metoda Lingvoinstruado de d-ro Gábor MÁRKUS kaj aliaj.

Mi tre bedaŭris, ke diskutado mankis al la ĉeestantoj, kiuj vere deziras tre efikan instrumanieron pri Esperanto al azianoj.

La urbo Quanzhou situas ĉe la marbordo de la markolo kun Tajvano. Tial la partoprenantoj ĝuis agrablan tempon pro la serena vetero, kaj pro la eblo viziti ekspoziciojn pri la longa historio kaj riĉa kulturo de tiu loko.

UENO Yuriko (Japanio)



De la 4-a ĝis la 5-a de novembro, kadre de la 8-a Azia Kongreso de Esperanto en la urbo Quanzhou, Fujian-provinco, okazis la 5-a ISOA organizita de la ĉina sekcio kunlabore kun la sekcioj en Japanio kaj Koreio, sub la aŭspicioj de la Komisiono pri Azia Esperanto-Movado (KAEM). En du duontagoj la kunveno kun 60 seĝoj estis plenplena de partoprenantoj. La seminario temo estis *lerni Esperanton per modernaj metodoj*. En la antaŭe okazintaj 4 sesioj ni ĉefe diskutis pri la diversaj malfacilaĵoj, kiujn multaj aziaj lernantoj ofte

renkontas en sia lernado de Esperanto, pri la kapabligo de instruistoj/gvidantoj en la Eo-instruado; ĉi-foje ni turnis nin al la metodoj, per kiuj lernantoj efike lernu nian lingvon. Estis 9 prelegoj kaj 2 demonstraj kursoj dum la ISOA. S-ino Mireille GROSJEAN, la prezidantino de ILEI, prelegis pri tio „kiel ellerni Esperanton”, estroj de tri sekcioj Japana, Ĉina kaj Korea respektive raportis pri la Eo-instruado en sia lando. Prof. d-rino Ilona KOUTNY prelegis kun la temo „Formado de Esperanto-instruistoj en universitato” kaj d-ro MÁRKUS Gábor pri Indramang-metoda lingvo-instruado, spertoj el lingvoinstruado en koreaj kaj tajlandaj universitatoj. La plej interesaj estis du demonstraj kursoj gvidataj de S-ro USUI Hiroyuki, laboranta ĉe EPCĈ, kaj S-ino XIN Qishuang, instruistino el la elementa lernejo de Taiyuan, Shanxi. La antaŭa kurso celis plenkreskulojn, kaj la lasta estis por infanoj. Kvankam ne multe da tempo restis por diskutado, tamen la postaj diskutoj estis tre aktivaj, ne mankis junuloj, kiuj montris grandan intereson al Eo-instruado. La sekvanta sesio okazos en Koreio.

GONG Xiaofeng (Ĉinio)

La 4-a Esperanto-semajno en la ĉina baza lernejo Baiyangshujie



La 12-an de decembro 2016, la Elementa Lernejo Baiyangshuji, en la urbo Taiyan, Shanxi-provinco, Ĉinio okazigis la 4-an Esperanto-semajnon kun temo *kun granda animo kaj amikoj en la mondo*, pli ol 1400 lernejanoj ĝin partoprenis. En la malferma ceremonio, la direktoro WEI Yubin parolis: „La antikvulo de Ĉinio diris, ke nobluloj havas grandan

amon kaj animon. Mi opinias, ke lernejanoj de la Elementa Lernejo Baiyangshujie ne nur devas havi honestan sintenon, diligentan kvaliton, progreseman spiriton, sed tamen ankaŭ devas posedi pli vastan vidpunkton, kompatan koron kaj animon por la tuta homaro, kaj la ideojn de egaleco kaj frateco.”

La lernejo okazigas Eo-kurson en la lernejo ekde la jaro 2008, por helpi la infanojn lerni fremdan lingvon. Dum la instruado ili rimarkis, ke la interna ideo de Esperanto tre utilas al la infanoj por la starigo de aktiva vidmaniero

de la mondo. Do ekde la jaro 2013 ĉiujare ĉirkaŭ la Zamenhofa Tago, la lernejo okazigas Eo-semajnon. En la semajno, la nacia kaj Esperantaj flagoj alte flirtis super la lerneja sportejo. La infanoj prezentis Esperantajn programerojn. La instruisto preparis diversajn lecionojn pri Eo. La infanoj kantis, dancis, pentris, verkis, legis, festis. La semajno fariĝis tre ŝatata festivalo por la infanoj.



WEI Yubin (Ĉinio)

Germanio

Klerigofertoj en Herzberg am Harz, Germanio en 2017

Studsiesioj, instruista kapabligo kaj kursofertoj de AGEI kaj la GEA-Filio por Klerigado kaj Kulturo en Herzberg

De preskaŭ dudek jaroj la Esperanto-Centro en Herzberg servas konstante por multflanka klerigado; krom diversniveleaj lingvokursoj specialan atenton ĝi donas al instrukapabligado, metodika trejnado kaj helpo al aktivuloj por orientiĝi en la Esperanto-movado kaj esti pretaj por informado, varbado kaj aliaj praktikaj movadaj taskoj.

AGEI kaj GEA-membroj ricevas ĝis 50% rabaton, GEJ-membroj povas peti 100%-an subvencion kaj repagon de veturkostoj.

Ni rekomendas regulan partoprenon en la klerigsesioj, prelegserioj, sed eĉ unuopaj studmoduloj helpas al faka kleriĝo. Akiru atestilon!

Gvidantoj: Peter ZILVAR, Zsófia KÓRÓDY kaj fakprelegantoj

Kelkaj gravaj datoj el la klerigprogramo en 2017:

1) **24-26.02.2017:** 77a Studsesio: Esperanto & Medicino, oficiala kurso pri Unua Helpo fare de Frank LAPPE; kune kun la UMEA-prezidanto d-ro Christoph KLAWE, studado de diversaj fakgazetoj kaj libroj el la biblioteko de Interkultura Centro Herzberg rilate al medicino kaj Esperanto

2) **07-09.04.2017:** 78a Studsesio, modulo pri historio, literaturo, multe pri Zamenhof, la familio, komparoj de la tiama tempo kaj nuntempo

3) **16-18.06.2017:** Staĝ-semajnfino: ordigo, katalogado, skanado, faklaborado en la Eo-biblioteko kaj arkivo. Helpo bezonata! Volontuloj, interesiĝantoj, lernemuloj bv anonci sin ĉe: zsofia.korody@esperanto.de

4) **29.09-03.10.2017:** TORPEDO 12 (Pedagogiaj Tagoj kun AGEI). Modernaj instrumentoj, didaktiko, instrukapablo; 79a GEA-Studsio: modulo pri metodiko, instruprogramoj, lernplatformoj

5) **08-10.12.2017:** 80a Studsesio: modulo pri Esperanto-literaturo kaj specifa Esperanto-kulturo, movada organizado, informado, varbado

Kelkaj kursoferoj en 2017: Esperanto-lingvokursoj (A1 - C1) por komencantoj, progresintoj, konversaciemuloj

17-19.03.2017: Semajnfinaj Esperanto-Kursoj en pluraj niveloj (ankaŭ kiel popolaltlerneja VHS-kurso)

09-18.07.2017: SEP – Semajnoj de Esperanto-Perfektigo. Intensaj lingvokursoj por familioj, infanoj, junuloj, plenkreskuloj; kulturaj kaj turismaj kromprogramoj. Staĝado kun observeblo de lecionoj de spertaj instruistoj, instrupraktiko por instruemuloj.

La biblioteko de Interkultura Centro Herzberg

Teme pri instruado, instruista kapablo, estas menciinda la kreskanta biblioteko de Interkultura Centro Herzberg, kie la speciala **Pedagogia-Metodika Fakkolektaĵo** estas je tuja kaj rekta uzo ne nur por AGEI-membroj, sed por ĉiuj studemuloj, legemuloj kaj interesiĝantoj pri lingvistiko, gramatiko, interlingvistiko, literaturo, metodologio, movadhistorio, kulturo ktp. La uzantojn bone helpas la elektronika, traserĉebla katalogo kaj konsiloj de spertaj fakuloj de la Esperanto-Centro. Centoj da utilaj libroj, helpiloj estas surloke je dispono, kelkaj estas eĉ aĉeteblaj aŭ lueblaj:

- lernolibroj el Germanio k. aliaj landoj
- internacie uzteblaj lernolibroj, gramatiklibroj, ekzercaroj

IPR 17/1 > 26



- lingvistikaj, interlingvistikaj verkoj,
- fakliteraturo pri la Esperanto-historio, movado, kulturo
- metodika-didaktika fakliteraturo
- instruhelpiloj: tabeloj, afiŝoj, kartoj, memor- kaj domengludoj
- materialoj por Cseh-metodo: ĉio por la t.n. instruista kofro
- infanlibroj, fabeloj, kantoj, facilaj legaĵoj, rakontoj
- sonmaterialoj, filmoj, vortaroj, bild- kaj fakvortaroj

Zsófia KÓRÓDY

Serbio



Lajčo IMRIĆ (1932-2016)

„Lajčo estas alta, maldika homo, ĉiam trankvila, preskaŭ nevidebla. Tamen, li estas ĉiam bonhumora, preta por interparoli, kun rideto, kun malferma rigardo kaj rapida paŝo.” – tiel karakterizis la tiam 80-jaraĝan prezidanton de la Esperanto-societo „Tibor Sekelj” en Subotica (Serbio) la ĵurnalisto, Dimitrije JANIČIĆ. (*„Pli riĉa vivo – dank` al Esperanto”*, *Beograda Verda Stelo*, sept.-dec. 2012)

La svelta figuro de tiu agema persono nun aperas nur en niaj memoroj, ĉar li poreterne forlasis nin

la 19-an de aŭgusto 2016.

Esperanton li komencis lerni en 1954 ĉe profesoro Ernesto VEIS. Laŭ la profesio li estis profesoro de la anglaj lingvo kaj literaturo. Ĝis la emeritiĝo li laboris en la Malferma Universitato en Subotica, kaj danke al li, nia Eo -societo dum jaroj povis senpage uzi ĝiajn salonojn por kursoj, kunvenoj kaj solenaj Eo-eventoj. Li estis tre aktiva esperantisto kun eksterordinara lingvoscio kaj plurjaraj pedagogiaj spertoj en edukado de esperantistoj. Krom la gvidado de kursoj de la internacia lingvo li partoprenis plurajn Esperantajn kongresojn kaj renkontiĝojn. Dum multaj jaroj li estis membro de ILEI kaj UEA, eĉ delegito de UEA por instruado en Subotica. Kiel prezidanto de nia Eo -societo, sian lastan kurson li gvidis preskaŭ ĝis la fino de sia vivo. Niajn plej profundajn kaj sincerajn kondolencojn al la familio Imrić.

*Nome de la esperantistoj en Subotica,
Aranka LASLO*

IPR 17/1 ➤ 27

JUNA AMIKO, LA JUVELO DE ILEI

Tiun laŭdan esprimon mi aŭdis kaj kompreneble mi ŝatas. **JUNA AMIKO** havas longan historion, ĝia januara numero de 2017 havas la numeron **150!!** La unua numero aperis en novembro 1972 kaj ĝia kovrilpaĝo montras la kolombon kiel pacosimbolon konatan el la Biblio. Tio estas, ke de jardekoj skipo zorgas pri valora enhavo de la revuo. Nuntempe 12 ĝis 18 personoj kontribuas sendante tekstojn, enigmojn, kantojn, krucvortenigmojn, recenzojn, bildstriojn, desegnaĵojn kaj aliajn verkojn kompreneblajn kaj interesajn por legantaro inter la aĝo de 10 kaj 100 jaroj. Post redakta kaj enpaĝiga laboro de Stano MARČEK kaj atenta provlegado mia la revuo iras al tri



korektistoj, (DOI Chieko en Japanio, Karine ARAKELJAN en Armenio kaj „Trezoro” en Ĉinio), kiuj ĉasas tajperarojn, troajn spacojn, troajn komojn, mankantajn literojn k.s.

Mi volas diri DANKON al ĉiuj tiuj personoj, kontribuantoj kaj korektistoj, kiuj el ĉiuj mondopartoj kontribuas al la kvalito de nia revuo. Post tiuj konstatoj mi esprimas la deziron, ke multe pli da esperantistoj **abonu la revuon**, ĉar tio donus pli altan valoron al la laboro de la skipo.

Ekde 2015 la revuo aperas kvarfoje jare. Ĝi estas parte kolora. La numero 150 estos **PLENKOLORA**. La abontarifoj troviĝas en la retejo de ILEI www.ilei.info/revuoj/index.php?lingvo=eo.

Oni povas aboni la revuon rete pagante pli malaltan abontarifon.

Ĉiuj numeroj estas konsulteblaj sur la hungara retejo www.eventoj.hu/juna-amiko/.

Al tiuj personoj en Hungario, kiuj ĉiujn paĝojn skanis, mi diras ankaŭ grandan DANKON.

Nun la estraro de ILEI estas preparanta demandaron al la instruistoj por scii, kiom ili uzas la paĝojn de **JUNA AMIKO** en sia instruado.

ABONU LA REVUON JUNA AMIKO !!

DONACU TIUN ABONON !!

TIEL VI SUBTENOS LA LIGON ILEI KAJ LA MOVADON !!

IPR 17/1 > 28

Internacia Konferenco de Neregistaraj Organizoj

ĉe UNESKO en Parizo 12/13/14. 12. 2016

Monique ARNAUD, Jean-Pierre BOULET kaj Pascale VOLDOIRE partoprenis kiel observantoj la Internacian Konferencon de Neregistaraj Organizoj (NRO-oj) ĉe UNESKO dum Oleksandra KOVYAZINA, François LO JACOMO kaj Renée TRIOLLE estis la oficialaj reprezentantoj de UEA. Vojaĝis al tiu Internacia Konferenco proksimume 250 partoprenantoj, membroj de 120 kunlaborantaj NRO-oj, multaj observantoj kaj, pli multnombraj ol kutime, reprezentantoj de Membro-Ŝtatoj, kuraĝiga situacio! La konferenca temo estis „defioj de ciferuma revolucio por la NRO-oj”. Eric SADIN, juna franca filozofo, atentigis nin pri la evoluo de novaj teknologioj kaj iliaj danĝeroj. Pli kaj pli, homoj perdos siajn eblojn mem decidi... robotoj superos ilin. En alia prelego ni aŭdis pri la uzo de poŝtelefonoj rilate edukadon en tre izolitaj lokoj por lernantoj kaj instruistoj kaj por handikapuloj, sed foje mankas kontrolo de la informoj kaj tio okazigas misinformojn. Rilate al lingvoj, el 6000 lingvoj nur 400 aperas en la reto kaj bedaŭrinde multaj lokaj lingvoj malaperos. Komence de la dua jarmilo UNESKO eldonis gravan libron „Atlaso de endanĝerigitaj lingvoj en la mondo” por listigi ilin kaj samtempe provi protekti ilin. ILEI havis fruktodonajn kontaktojn kun oficialaj reprezentantoj de pluraj asocioj ligitaj al UNESKO. Tiucele ĝiaj reprezentantoj disdonis diversajn dokumentojn kaj tute kontentige ili malkovris, ke inter tiuj estis homoj, kiuj iam lernis Esperanton (junulo el Togolando) aŭ eklernas kaj jam agas por Eo (*International Police Association*). Necesas trovi taŭgajn homojn por plu agi en tiu favora medio. La nunaj respondeculoj



povos trejni ilin. Tiuj homoj devos iri kaj loĝi en Parizo dum kelkaj tagoj ĉiujare. Ĝentile kaj respektoplene la deĵorantoj alparolas la diversajn delegitojn kaj disdonas dokumentojn uzante la francan aŭ la anglan, kaj raportas al la estraro de ILEI. Se tio interesas vin, bonvolu nepre kontakti unu el ili aŭ la prezidanton kiel eble plej frue.

Surfote (de maldekstre): O. Kovyazina, M. Arnaud, P. Voldoire, J-P. Boulet
Raportis M. ARNAUD (monique.arnaud@aliceadsl.fr) kaj
J.P. BOULET (bouletjeanpierre@gmail.com)

Universitata agado: jen bona ekzemplo

Esperanto-rumana kolokvo en Timiŝoaro

En la Okcidenta Universitato de Timiŝoaro (Universitatea de Vest din Timiŝoara), 11-12 nov. 2016, okazis *Esperanto-rumana scienca kolokvo „Esperanto – ponto inter lingvoj kaj kulturoj”*, organizita de la Fakultato pri Beletro, Historio kaj Teologio kunlabore kun Esperanto-Asocio de Rumanio (EAR), surbaze de skriba kunlabordokumento. La ĉeforganizantoj estis



d-rino Mariana PITAR (*dekstre sur la apuda foto*), docento de la Okcidenta Universitato kaj estro de la Katedro de latinidaj lingvoj, kaj Aurora BUTE, prezidanto de EAR. Partoprenis 16 prelegantoj el 8 landoj, el kiuj 3 ne ĉeestis, sed iliaj prelegoj estis tra-legitaj.

Inter la podianoj de la solena malfermo, kun la menciitaj ĉeforganizantoj, sidis kaj salutis la partoprenantojn vicrektoro d-rino Irina MACSINGA, vicdekano d-rino Loredana PUNGĂ, kaj Eo-flanke prestiĝon de la kolokvo markis vicprezidanto de UEA Stefan MACGILL. Krom la Universitato, la Kolokvon okazintan kadre de la

eventoj por Timiŝoara – Eŭropa Kultura Ĉefurbo en 2021, subtenis la Sindikato de la Okcidenta Universitato kaj la Urba Kulturdomo de Timiŝoaro.

En sia enkonduka prelego Stefan MACGILL parolis pri *Perspektivoj por la Universitata Kunlaboro* emfazante la gravecon de kunordigata laboro kaj dispono pri kompleta superrigardo de la universitata Eo-agado, en kiu precipan rolon havas ILEI, CED kaj UEA.

Diversajn aspektojn de multlingveco, kiuj malfermas aplikspacon por Esperanto, analizis Nina DANYLYUK (*Lingva situacio kaj lingva politiko en Ukrainio*) kaj Davide ASTORI (*Jarmilaj evoluigaj celoj kaj komunikado*) kaj

pri konkretaj aplikoj parolis Aranka LASLO (*Fakrondo de Esperanto en plurlingva mezlerneja medio*) kaj Constantin-Ioan MLADIN (*Prilep – Urbo de Esperanto. Monografio*).

La lingvon mem, ĝiajn lingvistikajn trajtojn, didaktikan rolon kaj uzadon de Eo-kulturaj verkoj en Eo-pedagogio traktis Mariana PITAR (*La sistemo de afiksoj en Esperanto: tradukmalfacilaĵoj por la rumanaj parolantoj*), Mireille GROSJEAN (*Lernhelpa efiko de Esperanto*), Günter LOBIN (*Esperanto – lingva modelo por fremdlingva propedeŭtiko*) kaj Radojica PETROVIĆ (*Progresa alproprigo de Esperanto per „Perla metodo”*).

Aliaj prelegoj ne strikte traktis, sed per si mem ekzemplis Esperanton kiel ponton inter lingvoj kaj kulturoj komunikantan sciojn pri gravaj personoj (Aurora



BUTE: *Constantin Brâncuşi – pioniro de la modernismo*, Đorđe DRAGOJLOVIĆ pri Tibor Sekelj: *Vojaĝo ĉirkaŭ la mondo, de Cenei ĝis Subotica*, Nadia OBROCEA: *Eugeniu Coşeriu kaj Esperanto*), aŭ pri temoj el la pedagogio (Sara KONNERTH: *Bazaj trajtoj de instruprogramoj*, Cosmina Simona LUNGOCI: *Evoluigo de parolaj komunikadkompetencoj per interagado dum fremdlingvaj kursoj*), fremdlingvaj literaturoj (Roxana ROGOBETE: *Eksofoniaj literaturoj – gvidmarkoj kaj ekzemploj*) kaj ekonomiko (Zlatko HINŠT: *Verko de John Maynard Keynes: „Ĝenerala teorio pri dungiteco, interezo kaj mono”*).

La laborlingvoj estis la rumana kaj Esperanto kun surekrana traduko (koncizigita) en la alia lingvo. La 16 resumoj kaj aŭtorprezentoj aperis dulingve en 52-paĝa resumaro de la Kolokvo. La plentekstaj prelegoj estos publikigitaj poste en aparta volumo.

La Eo-kulturan ĉarmon de la evento emfazis komunaj tagmanĝo kaj vespermanĝo, promeno tra la urbo kaj Eo-literatura ateliero ĉe la fino. La loĝado en komforta studenthejmo plifortigis la bonan impreson de la partoprenantoj. Gratulon kaj dankon al la organizintoj kaj subtenintoj!

Radojica PETROVIĆ (Serbio)

Per perloj al steloj!

Dum la Interuniversitata Internacia Eo-rumana Kolokvo, okazinta novembre 11-12, 2016, krom la sciencaj prelegoj okazis ankaŭ praktika programero, didaktika ateliero, kiun gvidis Radojica PETROVIĆ.



La *Perla Metodo*, kia la aŭtoro mem prezentis ĝin teorie en la prelego, estas *prograsa al-proprigo de Esperanto helpe de Eo-kulturaj juveloj kaj interkulturaj spertoj en Eo-lernado*, t.e. poemo, novelo, kanto, filmeto, faka artikolo k.s., ĉio en malstreĉa maniero, do ne „*per aspera ad astra*”,

kiel proverbis la romanoj, sed *per perloj al steloj*.

La metodo gravas ne nur pro la bela etoso, amuza, pensiga, krea, sed ankaŭ pro la okazo lerni pri la Eo-kulturo, tio kio, cetere, mankas al ni rumanoj. Oni laboras grupe, do gravas la komunikado, la kunlaboro. Komence ni devis rekonstrui el pecetoj bildojn de gravuloj de Esperantujo. Certe se ni jam konis la portretojn de la koncernaj personecoj la afero estis facila, se ne, ni eksciis pri la nomoj de por ni nekonataj famuloj. Fininte tion, Radojica gluis panelojn sur la muron, po unu por ĉiu jam konata esperantisto kaj disdonis al ni amason da paperetoj, tranĉitaj el folio enhavanta la vivprezenton de la koncernaj gravuloj. Nu, la tranĉo okazis ne nur horizontale, por refari la tekston logike, sed ankaŭ vertikale, meze de frazo, tiel ke ni devis juĝi, ĉu la aldoninda parto de la linio estas taŭga, sencohava, logika, kelkfoje ankaŭ gramatike ĝusta, ĉar la mankanta parteto devintus esti en akuzativo kaj tio, kion ni supozis aldoninda, estis en nominativo.

Post pena cerbumado precipe por la komencintoj Radojica regalis nin per poemo aŭ alia literaturaĵo de la koncerna aŭtoro. La ateliero povas esti pli ampleksa, ekzemple Radojica preparis ankaŭ muzikaĵon, filmeton k.s. sed nia cerbumado daŭris iom tro longe. Por ni rumanoj la ateliero estis ege interesa kaj por la instruantoj donis belan kaj novan instrumentodon. Certe por la kursgvidanto la metodo povas esti vera defio, ĉar li devas unue koni kaj poste serĉi literaturaĵojn. Do, ne „*per aspera ad astra*” en la Eo-instruado, sed *per perloj al steloj!*

Aurora BUTE (Rumanio)

Ekparolu!

de Katalin KOVÁTS (Hungario/Nederlando)

Kontribue al la kampanjo **Jaro de la Lernanto** *edukado.net* lanĉis sian programon **Ekparolu!** en januaro 2017.

La celo de la projekto estas:

- doni eblon al la ĵuslernintoj de Esperanto parole apliki la lingvon, ensociiĝi kaj informiĝi pri la programoj, kursoj kaj pluaj ebloj de studo
- vaste eluzi la liberajn fortojn de la movadanoj partopreni en la plua edukado de komencintoj
- fortigi la lokajn klubojn kaj la movadon.

La programo renkontigas la du flankojn: nome **nevoj/nevinoj** (komencintoj) kaj **onkloj/onkloinoj** (speciale trejnitaj esperantistoj) trovas unu la aliajn kaj povas havi skajpajn parolsesiojn.

La **genevoj** devus havi bazan nivelon de Esperanto, ekzemple fini la arbon ĉe Duolingo. Ni donas al ili 10 eblojn konversacii kun maksimume dek spertaj esperantistoj. La konversacioj okazas

pere de skajpo. La renkontiĝojn eblas aranĝi helpe de agendo. La **geonkloj** estas spertaj esperantistoj, sed ne nepre instruistoj. Ilia tasko estos la paroligo de komencintoj. La onkloj havu minimume B2-nivelon (prefere kun KER-atestilo). Ili ricevos metodikan trejnadon kaj teknikan helpon uzi skajpon.

Por partopreni en la projekto kaj la genevoj kaj la geonkloj devas trapasi testserion. Dum la laboro kaj la genevoj kaj la geonkloj povas elŝuti helpmaterialojn, vortlistojn. Post la fino de la 10 parolsesioj la genevoj povas resti en la sistemo kaj regule ricevos informojn, helpon, novaĵleterojn kaj programproponojn. La plej spertaj povas fariĝi ankaŭ geonkloj, kvazaŭ redonante al aliaj personoj la ricevitajn spertojn kaj helpojn.

La partopreno en la projekto estas **senpaga**. Tio signifas, ke la genevoj ne devos pagi por la sesioj, kaj la geonkloj ne ricevos monon por la farita laboro. Tamen la plej diligentaj estos premiataj.

Jam en la unuaj tri semajnoj de la projekto aliĝis preskaŭ 100 personoj, el kiuj la duono rapide trairis la testseriojn kaj tuj eklaboris. 25 geonkloj por la unuaj semajnoj proponis en la agendo proksimume po 300 sesiojn. La



genevoj, iom malkuraĝe, mendis nur dudekon da renkontiĝoj. Espereble ĉiuj menciitaj ciferoj multobliĝos baldaŭ.

Post la unuaj du monatoj Katalin KOVÁTS, la redaktoro kaj kreinto de la projekto, lanĉos grandan varbkampanjon por trovi kaj geonklojn kaj genevojn kaj profitigi el la parolsesioj kiel eble plej multe da personoj. Per tiu ĉi agado *edukado.net* ne nur la lingvospertojn volas altigi ĉe la komencintoj, sed donas okazon al multaj esperantistoj, kiuj ne trovas en sia loĝloko kursanojn, utile kontribui al la movado. La projekto kreas eblon je mondskala uzo de la lingvo, renkontigo de diversnaciaj personoj kaj ebligas sperton de interkulturaj renkontiĝoj.

La konstruigo de la programo kostis plurmil eŭrojn. Ĝin realigi eblis parte danke al specifaj mondonacoj de la membroj kaj danke al la rezervmono de la paĝaro. Se vi volas subteni la projekton, via donaco estas tre bonvena.

Tiuj, kiuj havas emon partopreni kiel onklo aŭ onklino aŭ volas spertigi al siaj kursanoj parolplezurojn kun alilandaj esperantistoj, membriĝu ĉe *edukado.net* kaj vizitu la paĝon <http://edukado.net/ekparolu!>

Helplibro por instruistoj

Tatjana AUDERSKAJA, „Intelektaj amuzoj. Lingvaj ludoj en Esperanto”, Mondial, Novjorko, 2016, ISBN 9781595693228, 114 paĝoj. Mola bindo, 8.5" x 11" (21,5 cm x 28 cm)

Jen la libro, kiu povas utili al instruistoj de diversgradaj Esperanto-kursoj (niveletoj A2 – C1) aŭ, en alia skalo, de progresantaj, paroligaj kaj perfektigaj kursoj. La pli-ol-100-paĝa libro konsistas nur el lingvaj ludoj en Esperanto, kio estas ne ofta en la historio de Esperanto. Ja nia lingvo jam estas sufiĉe matura por doni eblon kompletigi tiom ampleksan libron el 43 ludoj kaj 1240 taskoj.

La ludoj estas diversaj: literaj, vortaj, tekstaj, ŝercaj, eĉ poeziaj. Por solvi iujn taskojn, sufiĉas nur koni la alfabeton, la afiksaron de Esperanto kaj simplan leksikon. Aliaj ludoj postulas pli profundan konon de la lingvo; kaj iuj ludoj bezonas sufiĉe vastajn kulturajn sciojn: pri nia literaturo (la aŭtoroj kaj iliaj verkoj), pri la movado (la nomoj de famaj esperantistoj). Oni devas scii ankaŭ la proverbojn de Zamenhof, niajn „popolajn” Esperantajn kantojn kaj eĉ la Esperantan poezion!

Do, oni povas uzi la libron en la plej vasta gamo de kursoj, por preparigo (kaj prepariĝo) al ajnagradaĵaj ekzamenoj kaj simple por pliprofundigi la lingvoscion. Eblas okazigi konkursojn inter lernantoj surbaze de ludoj, kun diversaj celoj: ĉu kiu plenumos la taskojn pli rapide, ĉu kiu pli multajn solvojn trovos dum la difinita tempo, ĉu kiu pli multajn ekzemplojn donos aŭ pli multajn similajn vortojn elpensos... La konkursoj mem povas okazi inter teamoj el kelkaj personoj aŭ inter apartaj lernantoj. La pedagogiaj ebloj ĉi tie estas senlimaj.

Mi dum longa tempo organizis surbaze de tiuj lingvaj ludoj paroligajn kaj perfektigajn kursojn en Esperantaj aranĝoj kaj en mia propra junulara Eoklubo. Kaj ĉiam mi rimarkis, ke homoj lernas kun viglo, kun gajo en la okuloj. Ja sendepende de la enhavo de la ludo, ĉiam bezonatas, krom konkretaj scioj, ankoraŭ unu tre grava afero: spriteco, kapablo kompreni la ideon (unu el la ludoj ĝuste tiel nomiĝas: „Komprenu la ideon!”). Kaj la ĝojo KOMPRENI, solvi iun neatenditan aŭ eĉ ŝercan taskon (en la libro estas ankaŭ la ĉapitro „Ŝercaĵ taskoj”) donas al la lernanto ĝojan senton de memsufiĉeco, kies agrablo transiras ankaŭ al la lingvo mem. Oni ja ŝatas tion, kion oni bone scipovas!

Interalie, la libro enhavas ĉapitron „Langorompiloj originalaj”, kie troviĝas langorompiloj por trejni ĉiujn Esperantajn sonojn, kaj ankaŭ la sonkombinojn, malfacilajn aŭ nedistingeblajn en kelkaj lingvoj, ekz. la japana, itala, rusa.

Apartan ĉapitron konsistigas „Krucenigmoj”: klasikaj, hungaraj, italaj, duoblaj, rondaj, ĉenaj. Kompreneble ĉiu tasko havas plenan kaj detalan respondon fine de la libro. Oni povas uzi la libron por memlernado, memedukado, memprepariĝo al ekzamenoj. Sed, verdire, tiuj ludoj povas esti uzataj ne nur en edukaj celoj, sed simple por la plezuro de la ludantoj: dum diversaj klubkunvenoj, Esperantaj aranĝoj kaj kongresoj.

La libro naskiĝis rezulte de longa sperto de l’ aŭtoro kiel en instruado, tiel en partopreno en t.n. „Intelektaj Ludoj”, ŝatokupo de multaj ruslingvanoj en diversaj landoj de la mondo: Germanio, Kanado, Israelo, Usono ktp.

Kontaktadreso: Tatjana AUDERSKAYA (Ukrainio), <verda99@mail.ru>

EDUKADO AL RESPEKTOPLENA TURISMO

Vendisto iras al alia lando por proponi siajn varojn. Tio ne estas turismo.

Soldato iras al alia lando por batali. Tio ne estas turismo.

Junulo iras al alia lando por trovi laboron kaj ekloĝi tie. Tio ne estas turismo.

Turistoj kuristoj: ellitiĝi, enbusiĝi, dormeti en la buso, elbusiĝi, viziti kaj foti, enbusiĝi, enhoteliĝi, enlitiĝi... Kion oni povas kapti de nekonata lando irante grupe, rapide, senripoze, ... Kelkaj eĉ kunportas siajn manĝojn por ne malkovri fremdajn gustojn.

Vojaĝanto dediĉas tempon al malkovro, sidas sub arbo, observas la mondon, balbutas kun lokanoj, meditas en templo, fotas de tempo al tempo.

Kaj ni esperantistoj? Ĉu ni estas kutimaj turistoj, aŭ vojaĝantoj malfermitaj aŭ aparta etno respektoplena? Ĉu gastigado, kiu estas senpaga kaj reciproka, helpas al ni profunde malkovri mondopartojn kaj aliajn homaranojn? Ĉu nia komuna justa lingvo estas magia ilo por amikiĝi?

Jen padoj, spuroj, vojoj por niaj koreaj pripensoj okaze de nia 50-a ILEI-kongreso en Busano.

Mireille GROSJEAN, Prez de ILEI

SIMPOZIA ALVOKO

ILEI-Simpozio

Edukado al respektoplena turismo

Busano, Korea Respubliko, 20/21 julio 2017

En la jaro 2017, kiun UN deklaris *Internacia jaro de daŭropova turismo*, en kiu la Korea Turisma Organizo subtenas la organizon de la 102-a UK kaj la Busana Turisma Organizo la 50-an ILEI-Kongreson, ILEI enfokusigas la turismon sub la lumo de sia laŭstatuta celo: *Edukado al estimo de la homo kaj al respekto al la vivo kaj al la naturo*.

Turismo signifas vojaĝadon aŭ ekskursadon por plezuro aŭ sporto. En la ŝtata ekonomio ĝi estas grava branĉo, unu el la fontoj de la malneta nacia

produkto plenigantaj la ŝtatan buĝeton. En la Esperanto-komunumo okazas la Esperanto-turismo kiel unu formo de la ekonomio de Esperanto – fonto de financaj rimedoj de Esperanto-organizoj, sed ankaŭ kiel vojo kaj rimedo de disvastigado de Esperanto kaj ĝiaj servoj al homoj, institucioj kaj al la homaro. La Universala kaj fakaj kongresoj de Esperanto, Esperanto-staĝoj kaj kursaroj, festivaloj, novjaraj kaj aliaj renkontiĝoj de esperantistoj, la Pasporta Servo, estas iuj el ĝiaj formoj. La klopodo komunikiĝi rekte kun loĝantoj de la vizitata regiono estas ĝia grava trajto.

En la pedagogia kunteksto ĝi povas esti studtemo de ĝenerala kleriĝo kaj profesia kapabliĝo, sed ankaŭ instrurimedo kaj lernmedio. Ĝi renkontigas homojn kaj kulturojn, malfermas komunikproblemojn kaj proponas la solvojn. Edukado al respekto en turismo – respekto al la turistaj gastoj kaj gastigantoj, al naturaj kaj kulturaj valoroj de la turismaj lokoj, al la homo kaj al la naturo – estos en la fokuso de ILEI-simpozio pri la kongresa temo, kiu laŭtradicie okazos en la lastaj du kongresaj labortagoj.

Ĉiuj aliĝintoj de la kongreso aŭtomate rajtas partopreni en la simpozio sen apartaj aliĝilo kaj kotizo. Tiuj, kiuj volas aliĝi nur al la simpozio kiel preleganto kaj/aŭ aŭskultanto, povas uzi la saman aliĝilon kiel por la tuta kongreso kaj pagi la nursimpozian kotizon laŭ la kotiztabelo kiu akompanas la elektronikan aŭ la printeban aliĝilojn atingebajn tra <http://www.ilei.info/agado/Busan2017.php>.

Jen kelkaj sugestoj por prelegtemoj, tamen sen limigo al nur tiuj ĉi:

1. Pedagogiaj valoroj de turismo
2. Turisma ekonomio de la Esperanto-komunumo
3. Kleriga turismo
4. Profesia edukado por turismo
5. Komunikaj problemoj kaj solvoj en turismo
6. Interkulturaj proksimiĝoj per Esperanta turismo
7. Aprezo de kulturaj specifaĵoj, naturo kaj vivmaniero de vizitataj lokoj
8. Kompreno de bezonoj kaj kulturaj specifaĵoj de vizitantoj
9. Faka terminaro kaj turisma literaturo en Esperanto

Se vi volas prelegi pri tiu ĉi temaro, ni tre kore invitas vin sendi al la organizantoj vian prelegproponon kun jenaj elementoj:

- prelegtitolo,
- nomo kaj institucio de la aŭtoro,
- resumo en 100-200 vortoj,

- 3 - 5 ŝlosilaj vortoj, kaj
- 150-vorta prezento de la aŭtoro
- preskvalita foto de la aŭtoro.

Vian prelegproponon kun tiuj elementoj bonvolu sendi ĝis la 15a de majo 2017 al: radojica.petrovic.rs@gmail.com, aŭ al la poŝtadreso de la estrarano pri kongresoj trovebla sur la interna kovrilpaĝo de IPR. Viaj prelegoj devas esti originalaj, ne publikigitaj nek planataj por publikigo aliloke. Viaj resumoj estos publikigitaj en la *Kongresa Libro*. Por la prelego vi disponos pri 20 minutoj kun 10 minutoj por diskuto. Se vi liveros plenan tekston de la prelego ĝis la 30-a de septembro 2017, ĝi estos publikigita en *Internacia Pedagogia Revuo*, aŭ alimaniere.

La lingvo de la simpozio estas Esperanto kun eblaj kontribuoj de neesperantistoj en la korea aŭ angla. Se la prelego ne okazos en Esperanto, la ĉeestantoj ricevos resumon aŭ alimaniere interpreton en Esperanto. Por neesperantistaj partoprenantoj estos certigita prezento de Esperantaj prelegoj en la korea aŭ angla lingvoj.

Limdatoj

- 2017-05-15: Sendo de prelegproponoj
- 2017-05-31: Informo pri akcepto
- 2017-06-15: Aliĝo kaj kotizpago (por ne jam aliĝintoj)
- 2017-06-30: Prelegantoj kaj organizantoj kunlabore aranĝos 2- aŭ 3-lingvan prezenton de la prelegoj (dulingva ekranprezentaĵo / postsekva interpretado / presita koncizigo de la prelego en alia lingvo)
- 2017-06-30: Definitivigo de la simpozia programo por *Kongresa libro*
- 2017-09-30: Sendo de prespretaj prelegoj por papera aŭ reta publikigo

Ni esperas vian entuziasman reagon al ĉi tiu alvoko kaj vian partoprenon en la simpozio. Bonvolu diskonigi la alvokon al aliaj eblaj interesatoj, esperantistaj aŭ neesperantistaj. La simpozio estas grava evento dum la ILEI-kongreso, kiun ni komune povos sukcese realigi. Bonvenon!

Estrarano pri kongresoj, Radojica PETROVIĆ

INFANA UNIVERSITATO

En Esperanto-kursoj la kursgvidantoj uzas diversajn instrumentojn por lernigi la lingvon kaj krei novajn esperantistojn. Eksterkurse funkcias la natura metodo: naski esperantistojn, esperantigi la infanojn denaske. Kaj partoprenigi ilin en la E-movada vivo, ekzemple tiel kiel en REF (Renkontiĝo de Esperanto-familioj), IIK (Internacia Infana Kongreseto dum UK), Festa Semajno aŭguste en la Kastelo Grezijono, eble ankoraŭ kelkloke. Kaj daŭre eduki ilin per Esperanto kaj pri Eo-kulturo tra la tuta infanaĝo.



En la 90-aj jaroj de la pasinta jarcento ILEI havis dum siaj konferencoj ILEI-gimnazion kun amuzaj lecionoj el diversaj fakoj por lernej-aĝaj esperantistoj, sed tio jam longe ne ripetiĝas. Tamen ĉe la ĉefevento de ILEI foj-foje gastas esperantistoj de infanĝardena aŭ lerneja aĝo. Ĉarma estis la ĉeesto de la 3-jara Elvira kaj la 8-jara Matensuno kun ankoraŭ kelkaj lernejoj en Oostende, 2015. La ĉinaj geknaboj Matensuno kaj Suno kun 4 samaĝuloj el Rumanio sopiris en Nyíregyháza, 2016, programerojn adaptitajn al iliaj aĝo kaj emoj. Ne nur amuzajn lecionojn el diversaj lernejprogramaj fakoj, sed ion pli ampleksan, pli varian por amuziĝi kaj kune lernante ĝui la vivon en Eo-komunumo.

La Estraro de ILEI konsideras la eblecon de revivigo de ILEI-gimnazio. Aŭ de porinfana/porjunula programo daŭriganta la ILEI-gimnazian tradicion kun nova kvalito. Infana universitato povas esti la taŭga formo. La termino universitato ligiĝas al la supera nivelo de klerigado kaj profesia kapablo en ajnaj fakoj de la sciencoj kaj artoj. En iuj landoj ekzistis kaj plu ekzistas Popolaj kaj Laboristaj universitatoj kun gamo da instruaj kaj kulturaj aktivajoj por klerigado kaj profesia lertigado en diversaj kampoj sur la niveloj baz-, mez- kaj altlerneja. Infana universitato en Esperantujo simile povas kovri vastan gamon da edukaj, klerigaj, kultur-artaj, sportaj, ludaj kaj vartaj bezonoj de la infanaĝa E-publiko.

Internacia Infana Kongreseto (IIK) kaj Renkontiĝo de Esperantistaj Familioj (REF) plenumas tiun funkcion en limigita tempo de 7-10 tagoj malsammaniere. IIK grupigas Eo-infanojn en aparta loko proksime de UK, lasante al la gepatroj liberan tempon por ĝui la kapturane abundan kongresan

programon. En REF male, la gepatroj kaj infanoj pasigas la tempon kune kreante kaj ĝuante la eduk-ludan programon en sia eta kaj provizora Esperantujo. Infana universitato dum la kongreso de ILEI povas ebligi ambaŭ: kaj kunestadon de la gepatroj kun la infanoj, kaj tempodisponon por partopreno en elektitaj neinfanaj programeroj. Kaj ĝi povas akcepti ankaŭ instruistojn kun grupoj de infanaĝaj Eo-kursanoj sen aŭ kun la gepatroj aŭ parencoj. La gepatroj kaj infangrupgvidantoj povas solidare dividi la taskojn de prizorgo kaj programa gvidado de la infanoj laŭ interkonsentita tempoplano. Dum unuj deĵoras kun la infanoj kaj gvidas ilin tra la kongresa tempospaco, la aliaj ĝuas la kongresan programon, kaj poste alterne ŝanĝas la rolojn.

Alia grava funkcio de la Infana Universitato povas esti praktikejo por instrutrejntoj en la tradicia ILEI-kongresa instrutreja seminario, por iliaj provlecionoj kaj konatigo kun labormanieroj de spertaj E-instruistoj.

La ĉina Eo-instruistino SHI Xueqin – Neĝeta jam certigis la unuan grupon de infanuniversitatanoj en Busano ĉi-jare. Ŝiaj 14 infanaj Eo-kursanoj kaj deko da iliaj parencoj aliĝis al la Kongreso fine de decembro. La infanoj preparas kaj prezentos sian kontribuon al la kongresa programo. Ili meritas apartajn prizorgon kaj porinfanan kongresfadenon, kian provizos la Infana Universitato por ili kaj, esperinde, pliaj Eo-infanoj el diversaj landoj.

Radojica PETROVIĆ

Konkurso pri emblemo de Infana Universitato

La Estraro de ILEI alvokas kreemulojn, esperantistajn kaj neesperantistajn, membrojn aŭ ne-membrojn de ILEI, proponi emblemon de Infana Universitato – programo okazonta dum la Kongreso de ILEI. La esperantistoj estas bonvenaj kaj mem partopreni la konkurson kaj proponi ĝin al siaj konatoj – spertuloj pri grafika aspektigo kaj al lernantoj kaj studentoj de tiu fako en mez- kaj altlernejoj kaj universitatoj.

Difinoj kaj kondiĉoj

1. La *Infana Universitato* (IU) estas eduka, kultura kaj amuza programo por infanoj partoprenantaj Kongreson de ILEI kun siaj gepatroj aŭ instruistoj. Ĝi povas okazi ankaŭ dum aliaj Eo-eventoj, aŭ memstare. Ĝi ampleksas vartejon-ludejon, amuzajn lecionojn, sportajn ludojn, konkursojn,

ekskursojn kaj aliajn programerojn adaptitajn al lernejanaj kaj antaŭlernejaĝaj infanoj.

2. La emblemo kiel grafika simbolo de *Infana Universitato* devas esprimi ĝiajn esencon kaj etoson simplamaniere, elegante kaj ideoveke, sen teksto krom la akronima siglo IU.
3. La emblemo estu taŭga por kolora preso kaj nigra-blanka kopio, uzebla en kapteksto de leterpapero, sur dokumentujoj, porokazaj kovertoj, informiloj, aliĝilo, glumarkoj, insignoj k.s.
4. La konkursaĵo en ciferecaj formatoj JPG kaj PNG estu sendita al *radojica.petrovic.rs@gmail.com*, kopie al *ilei.sekretario@gmail.com*, kun mesaĝtitolo *Emblemkonkurso de IU*.

Taksado, elekto kaj premioj

La Estraro de ILEI nomumos fakan ĵurion por pritakso de la konkursaĵoj, kiu proponos elekton de la plej bonaj proponoj, eventuale sugestante al la aŭtoroj plibonigajn modifojn. La Estraro konsideros la raporton kaj proponojn de la Ĵurio kaj findecidos pri la uzota emblemo kaj premiindaj verkaĵoj. La premioj por la unua, dua kaj tria loko konsistos el diplomo, E-libro kaj abono al ILEI-periodaĵo aŭ kotizo por iu ILEI-evento.

Limdatoj

1. Sendo de konkursaĵoj: 2017-03-31
2. Raporto de la ĵurio: 2017-04-20
3. Informo al la aŭtoroj kun sugestoj pri modifoj: 2017-04-30
4. Sendo de modifitaj konkursaĵoj: 2017-05-15
5. Definitiva raporto de la ĵurio: 2017-05-31
6. Definitiva decido de la Estraro kaj ĝia publikigo: 2017-06-15

Publikigo

La decido estos komunikita al la aŭtoroj kaj publikigita tra E-movadaj komunikkanaloj kune kun informo pri maniero kaj tempo de transdono de la premioj.

INFORMOJ PRI ILEI

Laborkomisionoj

Ekzamena: Karine Arakelian (prez.), Mireille Grosjean (vicprez.), Christophe Chazarein, Mónika Molnár, Giridhar Rao, Jérémie Sabiyumva, Han Zuwu.

Elekta: Aurora Bute (gvid.), Zsófia Kóródy, Rob Moerbeek.

Kontrolo: Simon Smits, Orlando Raola.

Lerneja: Julian Hernández, Jennifer Bishop, Ronald Glossop, Marija Jerković, Luigia Madella, Ermanno Tarracchini, Mihai Trifoi.

Regulara: Marija Belošević, Rob Moerbeek, Stefan MacGill. Estrare: Mireille Grosjean.

Terminara: Miroslav Malovec, Ilona Koutny. Estrare: Mireille Grosjean.

Universitata: Duncan Charters (gvid.), Renato Corsetti, Goro Kimura, Ilona Koutny, Radojica Petrović, Kristin Tytgat. Estrare: Gong Xiaofeng „Arko”, Ivan Colling.

Enmovadaj partneroj (entute 14)

E@I (*Edukado ĉe Interreto*): Víťazná 840/67A, SK-958 04 Partizánske, Slovakia, info@ikso.net. Tel: (+421) 902 203 369. Retejo: <http://www.ikso.net/eo/>.

Fondaĵo edukado.net - funkciiganta la paĝaron de instruistoj, instruantoj kaj memlernantoj Direktoro: **Katalin Kováts**, Spaarwaterstraat 74, NL-2593 RP, Den Haag, Nederlando. Retadreso: redaktanto@edukado.net.

ICH (Interkultura Centro Herzberg): Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz, (+49) 55215983, Trejnsejnoj, metodikaj kursoj, pedagogia fakbiblioteko, internaciaj ekzamenoj, kontaktpersono: **Zsófia Kóródy**, zsofia.korody@esperanto.de.

IFEF (Internacia Fervojista Esperanto-Federacio): *vd. la Jarlibron de UEA*

TEJO (<http://www.tejo.org/>): Observanto de ILEI ĉe TEJO: **Radojica Petrović**. Observanto de TEJO ĉe ILEI: **Arina Osipova**.

UEA: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando, www.uea.org. Observanto de ILEI ĉe UEA: **Mireille Grosjean**. Observanto de UEA ĉe ILEI: **Stefan MacGill**.

kaj aliaj

Ekstermovadaj partneroj (entute 8)

ALTE (*Asocio de lingvaj testistoj de Eŭropo*) Repr. de ILEI: **Zsófia Kóródy**,

FIPLV (*Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj*): Repr. de ILEI: **Mireille Grosjean**.

UN (kun statuso de observanto): komisiitoj de ILEI: **Rob Moerbeek, Ron Glossop, Leysester Miro**.

Unesko (kun statuso de observanto): Repräsentantoj de ILEI: **Monique Arnaud** (ĉefdelegito), Ecole Chemin de l'Espéranto, Les Pelloux, FR-05500 Benevent et

Charbillac, *monique.arnaud@aliceadsl.fr*, Jean-Pierre Boulet, Pascale Voldoire.

kaj aliaj

Membreco kaj pagado por diversaj servoj

Membreco kostas 20 € en A-landoj (laŭ UEA-difino), **10 € en B-landoj kaj 2 € en C-landoj**, kun ricevo de 4 numeroj de *IPR* jare. Kun aliro nur al la reta versio de *IPR* membreco kostas **10 € por la A-landoj, 5 € por la B-landoj kaj 1 € por C-landoj**. Bonvenaj estas donacoj al la kaso de ILEI kaj al la fondaĵoj de ILEI. Sekciestroj en trideko da landoj akceptas kotizojn kaj donacojn; simile, perantoj por *Juna amiko* akceptas abonojn enlande.

Por informi pri viaj pagoj, bonvole skribu al Vilĉjo (Bill) HARRIS, Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530, Usono. <*ilei.kasisto@gmail.com*>. Bv klare indiki la celon de via pago. La pagoj por ILEI povas okazi a) pere de la nederlanda ILEI-banko aŭ b) pere de la ILEI-konto ĉe UEA. Jen detaloj:

a) Pagoj al la nederlanda banko de ILEI: numero 4676855 ĉe ING Bank N.V., IBAN NL55INGB 0004676855, BIC INGBNL2A. Bonvolu aldoni 5 € por la nederlandaj bankokostoj pagante el ekster EEA (Eŭropa Ekonomia Areo) kaj EU.

b) Pagoj al la konto de ILEI ĉe UEA: Por pagi al UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL 3015 BJ Rotterdam, bv uzi: ING Bank, Postbus 1800. NL-1000 BV Amsterdam (konto: 37 89 64; IBAN: NL72INGB0000378964; BIC/SWIFT: INGBNL2A). Bonvolu aldoni € 5 por la nederlandaj bankokostoj. Indiku vian nomon kaj vian landon, la celon de via pago kaj la konton de ILEI ĉe UEA: ilek-a. Ĝiri monon el via UEA-konto al ILEI-konto ĉe UEA estas facila ago.

* Simpla abono de *IPR* sen membreco: 24 €. Reklamtarifoj por *IPR*: 180 € por plena, 110 € por duona, 70 € por kvarona paĝo. Tio inkluzivas bazan grafikan pretigon; kostojn de ekstra pretigo oni rajtas fakturi. Sekcioj reklamante edukajn projektojn rajtas peti trionan rabaton.

* ILEI estas jure registrita ĉe la Komerca Ĉambro en Den Haag (NL) sub numero 27181064 kun sidejo ĉe la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo (NL).

* Retpaĝo de ILEI: <http://www.ilei.info>.

Redakciaj informoj

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): Marc CUFFEZ, *Elisabethlaan 295, BE-8400 Oostende*. **Presado**: Flandra Esperanto-Ligo, *Lange Beeldekensstraat 169, BE-2060 Antwerpen, Belgio*, tel: (+32-3)-234 34 00. **Redaktoro**: NÉMETH József, *Fő u. 41/5, HU-8531 IHÁSZ, Hungario*, *jozefo.nemeth@gmail.com*, www.ilei.info/ipr/; tel: (+36-70) 931-0530. La revuo aperas ankaŭ kasede registrita por leghandikapuloj. Informas: Rob MOERBEEK, *Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE BEVERWIJK, Nederlando*, <*moerbeekr@gmail.com*>.

**Ni fermis la nunan numeron la 15-an de januaro 2017,
redaktofino por la sekva numero: la 15-an de aprilo 2017.**

juna amiko

februaro 2016 • n-ro 1/2016 (146)



Konversaciaj temoj: Ni trafiku ĝentile
Ekstere: Erinacoj: la pikaj timuloj
Interkultura Mondo:
La interreta paĝaro IDEO
Porteblaj domoj: Geroj, tipoj, tendoj

INTERNACIA
ESPERANTO-REVUO
DE ILEI
POR LERNANTOJ
KAJ KOMENCANTOJ

juna amiko

novembro 2016 • n-ro 4/2016 (149)



INTERNACIA
ESPERANTO-REVUO
DE ILEI
POR LERNANTOJ
KAJ KOMENCANTOJ

La fabeloj de Anna Striganova
Konversaciaj temoj: vestaĵoj
AMO-seminario en Hungario
Sep kursoj dum BET en Litovio
Interkultura: Indas viziti Italion!

juna amiko

septembro 2016 • n-ro 3/2016 (148)




Konversaciaj temoj: Nova lernejo
Sukero: ĉu amiko aŭ malamiko?
Per pentroarto al Esperanto
Interkultura Mondo:
Konferenco de ILEI

INTERNACIA
ESPERANTO-REVUO
DE ILEI
POR LERNANTOJ
KAJ KOMENCANTOJ

juna amiko

majo 2016 • n-ro 2/2016 (147)



INTERNACIA
ESPERANTO-REVUO
DE ILEI
POR LERNANTOJ
KAJ KOMENCANTOJ

Interkultura Mondo:
La interreta paĝaro IDEO
Komunikado: Rapidega evoluo
Ekstere: Ringofoko, la akva grizulo
Konversaciaj temoj: Granda reordigado